Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 23 — trimonata

4/93

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: KOVÁCS Márta

Vic-redaktisto: Stefan MacGILL

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Kovács M., Ady Endre u.23-25 C
H-1221 Budapest
☎ + 36-1-226-3602 (hejma, kun respond-aparato)

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

ENHAVO

CHARTERS, d-ro Duncan, Mesaĝo por 1994 kaj plue 1
BARCSAY, Zsuzsa, Tekstoprilaborado por elformi produktivajn komunikajn kapablojn 5
28a ILEI-Konferenco; ĝisdatigaj informoj *(sjs/smg)* 13
Telegrame el Berlino: Raporto pri la estrarkunsido *(smg)* 14
Kalendaro de pedagogiaj aranĝoj por 1994 *(mb/smg)* 15
Deka Internacia Metodika Seminario en Estonio *(bzs)* 17
Mendilo por *Tendaraj tagoj* kaj alliaj libroservaj varoj 19
Sinprezento de akrobata rolulo el la tria kajero de *Tendaraj tagoj* 21
MacGILL, Stefan, Pesi du jarojn – de Voss ĝis Valencio 23
Tra la sekcioj – Ĉinio, Albanio, Latin-ameriko *(kn)* 29
Ekzamenoj UEA/ILEI: Kvin jaroj da intensa laboro *(smg)* 31

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5122. Internet: charters@csc1.prin.edu. *(Kunordigo, planado, rilatoj kun UEA kaj la movado, instruista trejnado).*

Vic-prezidanto: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj.*

Sekretario: Marija Beloševiĉ, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb-Crnomerec, Kroatio. Tel. (38 41) 57 60 92. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj nefaka programo.*

Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*

Membro: D-ro So Jinsu, Dept. de Ekonomiko, Univ Kangnam, Kugali Kihung-up. Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900, Koreio. Tel. (0331)281-5500. Faks. (0331)281-3604. *Universitata agado. Konferenco 1994.*

Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, DE-19412 Brüel, Germanio.Tel. (49 38483) 528. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI. Servoj al instrustoj, trejnado de instruistoj.*

Estrara komisiito: Stefan MacGill, Eso u 7 III, HU-1034 Budapest, Hungario. *Eldonado*

De la nova Prezidanto de ILEI...

Mesaĝo por 1994 kaj plue

Duncan Charters, Usono

Jam duonjaron post la Konferenco de ILEI en Valencio ni pensu kune pri la perspektivo por la Ligo dum la nova jaro kaj la antaŭvidebla estonteco. Kion ni atingis kaj kie ni koncentru niajn fortojn? Se vi atente tralegos la raporton de Stefan MacGill "Pesi du jarojn — Voss ĝis Valencio" (paĝoj 21-26), vi certe konscios kiom ni jam atingis kun la apogo de niaj subtenantoj per la fortostreĉoj de relative malgranda grupo de individuoj. Efektive, kiel atestis la ĉeestantoj de la pasintjara Konferenco, ni ŝuldas multon al nia antaŭa Prezidanto, kiu sukcesis antaŭenigi la laboron de la Ligo en la eldonado *IPR*, *Juna amiko*, *Tendaraj Tagoj*, en la instruado de pluraj seminarioj pri la situaci-komunika metodo, kaj multflanka faciligo kaj efektivigo de la projektoj de la Ligo. Kiel ni konstatis en Valencio, tamen, necesas ke ni ne dependu de unuopa Prezidanta motoro por sukcesigi nian laboron, sed ke la respondecon ni kune prenu por la diversaj projektoj kiuj bezonas nian atenton.

Grandan amason da homfortoj ni por multaj gravaj entreprenoj ne bezonas, sed dediĉitecon, fidindecon, kaj inteligentan kunlaboremon jes. Tion mi deziras maksimume faciligi. Dum Stefan daŭrigos sian laboron kiel komisiito pri eldonado, la Ligo mem reorganizas siajn respondecojn por daŭrigi ĝis maksimumo la impeton de la pasintaj jaroj. En marto kunigas pluraj membroj de la estraro en Berlino por pritrakti interalie tiujn organizajn demandojn, kaj mi invitas al ĉiuj, kiuj povas iamaniere subteni iniciatojn kaj daŭrajn servojn de la Ligo sin anonci al mi aŭ al la Liga sekretario, Marija Beloševiĉ. Ne ĉiuj povos iri al Koreio somere de 1994, tamen la ĉeestantoj povos atendi tre interesan programon. La Konferencon de ILEI gvidos (30-a julio - 5-a aŭgusto) en la Kangnama Universitato nia vicprezidanto, Ron Glossop, kun la surloka planado de nia estrarano d-ro So Jinsu. D-ro Glossop, Stefan MacGill, kaj mi partoprenos frusomere la 25-jaran kursaron de la Ŝtata Universitato de San-Francisko, kaj ankaŭ tie ni konsultiĝos por antaŭenigi diversajn projektojn de la Ligo.

Agadprogramo

En Valencio, mi pere de skriba enketilo demandis pri la graveco de diversaj elementoj en la agadprogramo de la Ligo. Klare evidentiĝis, ke la lastatempaj iniciatoj de la Ligo kaj de ĝiaj kunlaborantoj estas utilaj kaj apogindaj, kaj ke ĉiu estas grava por nia laboro. Du sufiĉe novaj iniciatoj atentindas, nome la gimnazio de ILEI kiu okazis jam duafoje dum la Konferenco kaj la internacia printempa renkontiĝo de infanoj en Grésillon, kiu ripetiĝos ĉi-aprile. Ambaŭ ŝtopas mankojn en la disvolvo de alloga eduka kaj distra programo por flegi la intereson de junaj lernantoj de la lingvo. Antaŭ ol prikomenti aliaj gravajn agadkampojn, laŭ la necesa prioritatigo de nia laboro, mi menciu unu ideon pri kiu oni komencis diskuti dum la U.K. en Valencio, ideo al kiu oni ne dediĉis ĝis nun multe da atento.

Kultur-klerigado

Ni ofte supozas ke kiel esperantistoj ni jam pere de ellerno de nia lingvo kaj nia akceptemo de la komunika egalrajteco de ĉiuj popoloj de la mondo, ni staras en la unuaj vicoj de tiuj kiuj forigis aŭ flankenmetis siajn etnajn antaŭjuĝojn kaj ke ni ne spertas transkulturajn komunikproblemojn Ni tamen konstatis, kun la helpo de aziaj esperantistoj kaj observado de nia laboro kaj interagado fare de fakaj spertuloj, ke ni ne tro fieru pri niaj ĝisnunaj atingoj. Interpopolan kompreniĝon oni ne atingas nur per la uzado de komuna lingvo, eĉ la nia, kaj per iom da bonvolo fare de ĝiaj pli aŭ malpli spertaj parolantoj.

Aliaj internaciaj organizaĵoj aparte atentadas specialan trejnadon por partoprenantoj, konsciante ke sen tio la celoj de la laboro ne estos atingitaj. Ĉu nia Movado bezonas gvidlibron, seminariojn por plikonsciigi la esperantistan popolon pri sia devo *vere* kompreni aliajn kultursintenojn el pli ol supraĵeca vidpunkto? Tiun demandon oni kredis grava, do ni komencos ĝin studi por la plifortigo de ILEI kaj de la laboro de la tuta Movado. Eksteraj observantoj supozas ke ni jam multe laboras en tiu kampo. Tamen kiom ni vere faris? Pripensinda afero. Mi invitas kunlaborantojn por esplori tiun demandon kaj fari proponojn por estonta agado se ni ne estas kontentaj pri la respondo.

Prioritatoj

Kiuj estu niaj nunaj prioritatoj? Nepridubeble grava aspekto de nia laboro estas atentigado pri la valoro de la instruado de Esperanto en la elementaj lernejoj, kaj sekva kuraĝigado kaj subteno de iniciatoj tiurilate . Dum jardekoj ni celis organizi, kiam eble kun la apogo de oficialaj instancoj, internaciajn eksperimentojn por definitive demonstri la tiunivelan utilon de la instruado de nia lingvo. Kiel ni ofte kaj pravigeble asertis, la lernado de la internacia lingvo valoras propedeŭtike por la studado kaj akirado de poste lernotaj negepatraj lingvoj. Kaj efektive, tiu aspekto tiel gravas por la favorigo de la publika opinio kaj oficialaj instancoj ke ni dediĉu al ĝi maksimume seriozan atenton kaj daŭran esploradon.

En Finnlando, kie en 1985 raporton pri la propedeŭtika signifo de nia lingvo akceptis la eduka ministerio, la leĝo nun permesas la instruadon de Esperanto kiel deviga lingvo se tion postulas la gepatroj. Parte pro la favora sinteno al tiu aspekto jam montrita de seriozaj lingvistoj kaj politikistoj, ELFI, la Esperanto Ligo de Finnlandaj Instruistoj, proponis ke dum la 1995-a U.K. en Tampere ni pritraktu tion kiel ĉeftemon de la tago de la lernejo. Krom tiu aspekto, la lingvo internacia demonstreble valoras en si mem kiel interkultura konsciigilo kaj internacia kontaktilo por element-lernejanoj. Sed kvankam jam okazis tia eksperimenta uzo de la internacia lingvo kaj priskribo de la rezultoj (interalie en la verko de Edward Symoens eldonita antaŭ kelkaj jaroj de ILEI kaj en anglalingva esplorstudaĵo lastatempe publikigita en Usono de ESF, la Esperantic Studies Foundation), ni bezonas pli ampleksajn, pli rigore ellaboritajn kaj esploratajn studojn sub oficialaj aŭspicioj.

Ni vidu nun kelkajn (ne ĉiujn!) gravajn flankojn de nia nuntempa agado.

Internacia lerneja eksperimento

La eblecon partopreni en tia oficiale aŭspiciita projekto ni povas havi jam en la nuna jaro, kaj tiucele ILEI kunlaboras kun UEA kaj aliaj organizaĵoj. Jam UNESKO principe indikis sian pretecon disponigi al tia eksperimento (sub la programo "Linguapax" por pacedukado) sumon de 25 mil dolaroj se ni kaj aliaj organizoj similan sumon kontribuos kaj se ni kapablos tion kunordigi. Se efektiviĝos tia projekto, ni bezonos realece, aldone al multaj volontuloj, kunlaborantaj instruistoj kaj klasoj en pluraj landoj, kunordiganton kiu povos al tiu projekto dediĉi kontraŭ salajro duonon de sia labortempo (t.e. 20 horojn semajne dum du jaroj). Necesos verki aŭ adapti la uzotajn materialojn, provizi gvidilojn, kaj organizi preparon de la instruistoj, kunlaboron de la klasoj, utiligon de jam disponeblaj rimedoj kiel tiuj de "Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo" (San-Diego, Kalifornio), kaj kompreneble profesinivelan pristudon kaj taksadon de la rezultoj. Se vi mem estas preta kunlabori en tia projekto. aŭ se vi konas eventualajn kandidatojn por konsidero kiel kunordiganton, klasinstruiston, aŭ volontulon, bonvolu informi al mi aŭ al Mark Fettes, kiu prizorgas la projekton por UEA. Ĉu ni atingos konkretajn rezultojn nun aŭ en posta okazo, tiu ebleco montras ke ni devas esti preparitaj por profiti tiajn okazojn kiam ili sin prezentos, por ke ni povu montri nian pretecon kaj ankaŭ ke ni havas la necesajn financajn kaj homfortajn kapablojn por tion efektivigi.

Televidebla aŭ vidbenda kurso

Kiel raportas aliloke Stefan MacGill, ILEI kunlaboras kun IEI (la Internacia Esperanto-Instituto fondita de Andreo Cseh en Nederlando), kaj ankaŭ kun grupoj kaj individuoj en Usono kaj aliloke laborantaj por antaŭenigi la ideon krei por internacia uzo altkvalitan video-kurson.

Unu el la plej bonaj eblecoj estas esperantigo de la konata lingvoinstruserio "Muzzy" de la brita BBC, kiu jam vaste komerce vendiĝas en la angla, franca, germana, kaj hispana. Se tio estas realigebla (kaj ni ŝajne havas eventualan aliron al la rajtoj ĝin adapti), ne estus malebla taŭga adaptiĝo ankaŭ al Esperanto, kiel oni cetere faras por aliaj lingvoj. "Muzzy" havas plurajn avantaĝojn: la "roluloj" estas desegnitaj, ne vivantaj personoj kies dublitaj voĉoj tre rimarkeble ne kongruas kun la lipoj kaj kies vestaĵoj post kelkaj jaroj elmodiĝas. La "lando" ne estas identigebla kun specifa tergloba nacio. Kaj ĉio estas prezentita por grafike komuniki la signifon de la aventuro kaj konversacioj tute en la cel-lingvo (la lernota lingvo, do internacie uzebla). Fine kaj tre grave, kun favoro reagis al la programo diverskulturaj kaj diversaĝaj lernantoj. Sukcese ĝin ĝuis kaj profitis antaŭlernejaj infanoj ĝis plenaĝuloj, fakte la tuta homa aĝ-gamo.

Dua vojo (kaj unu ne malebligas alian) estas filmado kun esperantistaj roluloj, en esperantista medio prefere diversloka: ĉe Universala Kongreso, dum aliaj internaciaj renkontiĝoj kaj vojaĝoj, en esperantistaj centroj kaj hejmoj. La baza rakonto aŭ prezentado povus esti tute en la I.L. kun la ebleco aldoni klarigojn aŭ lecionan materialon en diversaj etnaj lingvoj por loka aŭ regiona

uzado. En ambaŭ kazoj, necesus aldoni (por maksimuma efikeco) gvidlibron kaj suplementajn lernomaterialojn. Decidojn oni devos fari pri la celita aĝ-grupo, ĉu por klasanoj kaj izolitaj lernantoj, kaj ĉu ĝi estu sufiĉe alt-nivela por prezentado ĉe loka aŭ nacia televido. Rimedojn ankaŭ por tio ni disponas en la Movado. Temas ĉefe pri tio, ĉu trans la landlimoj ni sukcese kunigos la kreemon, financan apogon, homfortojn, kaj produkto-kapablon por realigi la projekton en ĝia plej dezirinda formo.

Instruista trejnado

Kiel vi konstatos de la raporto de nia antaŭa Prezidanto, la edukado kaj plu-edukado de niaj instruistoj kaj instruantoj estis unu el la ĉefaj fokusoj de la pasinta jaro, kaj tiucele disponiĝis granda parto de la financaj rimedoj de nia Ligo. Malgraŭ tio ke ni ne povos ripeti la saman nivelon de financa subteno, mi tamen ĝojis konstati ke la kursoj kiujn ni ja okazigis ŝajne donis impeton al multaj aliaj ĉi-jare. En Usono, prepari instruistojn estos aparta fokuso de la instruado dum la trisemajna kursaro (27-a junio - 15-a julio: informojn petu de Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, California 94010). De la 15-a ĝis la 24-a de julio denove okazos en Svislando intensiva prepariĝo por la ekzamenoj de ILEI/UEA ĉe KCE (Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds). Tion gvidos mia pasintjara kolegino en KCE Katalin Smidéliusz, kiu tuj antaŭe gvidos kurson por prepari instruistojn ĉe la Franclanda centro "La Kvinpetalo" (7-a - 12-a julio, Centre Espérantiste, Rue de Civaux, F-86410 Bouresse). Samlande fine de la somero ripetiĝos la aranĝoj por instruistoj ĉe Kastelo Grésillon (21-a de aŭgusto - 3-a de septembro: Kultura Esperanto-Domo, F-49150 Baugé). Povas okazi aliaj aranĝoj en Nederlando kaj en Poprad. Tiu plikonsciiĝo pri la bezono prepari pli bone la personojn kiuj okupiĝos pri nia instruado estas tre kuraĝiga, do mi esperas ke ĉiuj profitos la aranĝojn kaj maksimume subtenos ilin. Certe ni klopodos daŭrigi la ritmon en 1995.

Teknologio

La teknologio daŭre faciligas transnacian komunikadon kaj ĝeneralan klerigadon, kaj certe havos kreskantan rolon en la estonteco. Mi eĉ instruos kurson pri tiu temo somere en mia propra kolegio. Se ni mem ne utiligos ĝin, ni riskas preterlasiĝi de ĝi en la estonteco. Ni ne flankenmetu la eblecojn kiujn montris la vasta internacia uzado de komputilretoj (Esperanto estas ŝajne la unua lingvo, se ne ankoraŭ la sola, kiun oni efektive instruas pere de la uson-bazita "Internet"-sistemo!). Perkomputilaj kursoj multon aldonos al la lingvo-akirkapablo de izolitaj lernantoj, kaj jam montriĝis pli efika la alproprigo de Esperanto per hejmstudado kompare kun la lernado de aliaj lingvoj laŭ tiu metodo. Ni ne forgesu ke inter la instruistoj de la estonteco troviĝos multaj kiuj neniam vidos klasĉambron. Ĉu ni estas pretaj prepari ankaŭ ilin?

Konklude

Kun danko pro la subteno de ĉiuj, ni antaŭvidu bonan progreson en 1994!

Tekstoprilaborado por elformi produktivajn komunikajn kapablojn

BARCSAY Zsuzsa (Hungario)

Prelego dum la 7-a Internacia Metodika Seminario

Poprad, 1989.

La strukturo de la kontribuaĵo estas jena:

0. Enkonduko
1.1 Rolo de teksto en fremdlingvo-instruado kaj kriterioj de instruteksto
1.2 Algoritmo de tekstoprilaborado
2.1 Prezento de beletra teksto
2.2 Prilaborado de la teksto praktike, kun la seminarianoj, laŭ elektitaj ŝtupoj el la algoritma ĉeno
3. Konciza resumo, praktikaj konsiloj

0. „Praktiko faras la majtsron" diras germana proverbo; "Praktiko nin instruas" oni diras en Esperanto. Tiuj proverboj estas ege aktualaj en lingvo-lernado, same kiel en sporto aŭ muzikado. Kiel pianon ludi ne sufiĉas koni nur muziknotojn, sed necesas ĉiutage kelkan tempon ekzerci sin en pianludado — diris ofte profesoro SZERDAHELYI — same tiel por havi evoluintajn komunikajn kapablojn en iu lingvo, ne sufiĉas nur koni la lingvajn elementojn, sed oni devas regule ekzerci sin en parola kaj skriba komunikado. Kiam li denombras la faktorojn de efikeco de lingvolernado, li starigas jenan vicordon: 1) motivado 2) antaŭkonoj de la lingvolernantoj 3) kvanto kaj kvalito de la ekzercoj 4) metodo. Do, ekzercaro kaj ekzercado estas pli gravaj ol la instrumetodoj.

En la ĉiutaga instrupraktiko ni kutime eliras el teksto, kiun enhavas la lernolibro. Jena kontribuaĵo volas unue prezenti en formo de prelego, kian algoritmon havas tekstoprilaborado en fremdlingvo-instruado, poste prezenti en formo de leciono praktike kelkajn ekzerco-tipojn surbaze de konkreta teksto.

La kriteriojn de instrutekstoj kaj la priskribon de la fazoj kaj varioj de tekstoprilaborado mi transprenas el hungarlingva metodika konsultlibro*, kun elektado kaj adaptado al la lingvo Esperanto.

1.1 Kial estas grave eliri el teksto?

Teksto havas centran rolon en la lingvoinstruado, ĉar

- ĝi disponigas kontekston por ellernado kaj manipulado de lingvaj elementoj
- ĝi estas kompleksa, informriĉa enhav-portanto
- ĝi estas elirpunkto de la semantigo

* DÁLNOKI FÉSŰS, András: A nyelvoktatás-nyelvtanulás dilemmái és útválasztásai: Egy alapmódszer vázlata. [Dilemoj kaj vojelektoj de lingvoinstruado-lingvolernado: Skizo de iu baza metodo] Budapest, Akadémiai K. 1988. – 196 p. 16 cm.

- ĝi donas modelon nur surbaze de profunde analizita teksto havas sencon
  - fari alternadon de vortoj/esprimoj, resp. de strukturo
  - variigi stilon
  - ŝanĝi ĝenron ktp.
- nur ĝi povas esti bazo de fidinda, sistema didaktika proceso
- nur per ĝi eblas ekigi algoritmojn.

Dum la ekzercoj ŝanĝiĝas la karaktero de la teksto, kaj fine je pli alta nivelo ni revenas al la originala teksto kaj al ĝia originala enhavo.

Kia estas „ideala" lingvoinstrua teksto?

Dálnoki-Fésűs citas la principojn de H. Sweet, laŭ kiuj la enhavo de ĉiu teksto estu klara, simpla, intima, serena; pro tio
- konkreta, afereca/objektiva (kontraŭ abstrakta, subjektiva)
- ĝenerala, ĉiutaga (kontraŭ ekstra, individua)
- juneca (kontraŭ plenaĝeca, maljuneca)

kaj enhave, kaj stile, do nek majesta, literatura, nek vulgara, slanga k.s. krome oni apliku ĉiujn atentokaptajn artifikaĵojn de la prestoĥniko.

„Konkreta" signifas en tiu konteksto, ke la roluloj konfrontas problemojn; ili devas elekti, decidi, orientiĝi; ili havu interesan karkteron; kaj estu klara kaj interesa, kion ili parolas inter si.

Plej preferataj, ŝatataj estas tekstoj, kiuj rakontas, analizas gravajn, interesajn eventojn, okazintaĵojn; humurajn-anekdotajn aŭ lirikajn, teĥnikajn-kulturajn novaĵojn; laŭmodajn aktualaĵojn; mallongajn rakontojn; fabelojn, modernajn beletrajn fragmentojn aŭ landkonojn kun dialogoj, situacioj.

La kompletigaj legaĵoj estas samnivelaj kun la elirteksto, sed ŝanĝita estas la vidpunkto, alia la ĝenro kaj la tempo, renversita la kronologio; la teksto povas aperi en bildstrio, kun forlasoj, krome povas okazi intervenoj per demandoj.

Paralelaj tekstoj raras en lernolibroj, kaj pretendema instruisto daŭre ĉasas adekvatajn tekstojn – konstatas la aŭtoro de la menciita libro. (Mi deziras ĉi tie alvoki la atenton pri lernolibro „Basic Esperanto Course" de C. PIRON, kiu ja disponigas tre fantaziariĉajn paralelajn tekstojn.)

La ideala teksto-longeco estas diskutata fenomeno. Se interesa, bone strukturita, bildiga, vigla, riĉa, informhava estas la teksto, la longeco ne kaŭzas problemon. Tamen, la ideala longeco dependas ankaŭ de la aĝo de la lingvolernantoj, krome de la gramatika kaj la leksika denseco (novaĵo) kaj de la stilo. Laŭ spertoj plej oportune estas, se post signifo-klarigo oni povas legi la tekston dum 3–4 minutoj, do ĝi havu 900–1200 silabojn, resp. 50–55 frazojn; al kiu oni povas starigi 14–15 paroligajn kaj 20–25 analizajn demandojn.

Kriterioj por la denseco: instruteksto enhavu 2–3 gramatikajn novaĵojn, 3–4 sekundarajn formojn kaj – laŭ la aŭtoro 45–50 novajn vortojn, sed laŭ mia opinio nur ties duonon.

1.2 La ĉeno de la teksto-prilaborado kutime estas tre mankhava – konstatas Dálnoki-Fésűs –, plej ofte ĝi konsistas el komprenigo de la teksto, komenca konsciigo, fiksado en la memoro (tamen kun malmulte da aŭda, vida kaj motora demonstrado), – poste venas granda vakuo – kaj tuj rakontigo de la enhavo kaj konversaciigo. La aŭtoro donas multe plu kompletan ĉenon, kies tre koncizan kaj ne senmankan liston mi transdonas al vi:

Fazoj de la algoritmo

1. teĥnika – prepara — A – E
2. profundiga — F – J
3. individuiga — K – O

1. A signifo-malkovro (semantigo)
   gramatiko
   leksiko
   bildiga prezento de la temo en la cellingvo; vorto-listo
   B fonetika modelo kaj korektado
   artikulado, songrupoj, intonado, akcento, paŭzo, fonodinamiko
   laŭ frazoj aŭ kelkaj frazoj doni laŭtan (= aŭdan) modelon kaj konscie alternigi kun korusaj ekzercoj
   C parolrapideco
   en Eŭropaj lingvoj: 300–350–400 silaboj/minuto
   D esprimiva legado
   E oratora legado: akompani la legadon per gestoj, mimiko: traduki la tekston al lingvo de movoj, por pruvi la teksto-komprenon per manifesto de movoj
2. F kontrastiga legado – komenco de profundiga fazo: kontrastigo de lingvaj agoj
   G plilarĝigo de la memortrako: post ekzercado de ĉiu unuo ni ripetu ankaŭ la antaŭajn
   H traduko parola
   laŭvorta/strikta — sinkrona
   leĝera — sekva
   klariga–transforma — komerca k.s. traktado
   resuma
   de la cellingvo al la gepatra
   celo: ne kontroli la komprenon, sed alproprigi traduktoĥnikojn kaj signifo-variantojn

I rapidaj tradukoj de la gepatra al la cellingvo
el preparita, disponigita teksto

J libera prezento sen libro
aplikante la lingvajn kaj ne-lingvajn elementojn lernitajn

3. K formado de diversaj specoj de demandoj–respondoj

specoj:

a) ping-pong' (1 demando:1 respondo)

b) gamo de demandoj (2–3–4)
la respondo devas esti kompakta, tio evoluigas la vortuman kaj la strukturigan kapablojn
aperas la cerbumaj/rezonaj paŭzoj, karakterizaj al la konversacia stilo kaj la redemandoj, la transpontaj esprimoj (ja kie/kiel okazis...,kio koncernas la duan demandon..., responde al...)

c) paralelaj demando-vicoj
krom la agadoj-okazintaĵoj ni transiru al priskribaj kaj eksplikigaj demandoj
demandi pri kaŝita enhavo de la teksto – fantaziigo

d) disbranĉigaj demando-vicoj: al ĉiu demando de la ĉefa demando-vico starigi kompletigajn demandojn
laŭ la intereso de la gelernantoj en kiu ajn direkto estas gvidebla la temo (ekzemple eliri de matena vestado kaj alveni al kutimoj, modo, komerco, higienio ktp.)

e) katalizatora demandovico: instigi la lernantojn respondi al unu demando per 2–3 frazoj, kompili alineon
apliki konversaciajn parolturnojn, ekzemple:
al tiu demando mi mallonge povus respondi, ke...
nu, rilate al tio... pri tio venas en mian memoron, ke... konekse kun tio, mi deziras mencii... ktp.

f) demando-ĉeno (ĉendemandaro)

g) pridemandado

h) intervju-demandoj
rolantoj en demando–respondo:
demandanto/j: instruisto, preparita lernanto
aliaj lernantoj (ping-pong')

respondantoj
intepretanto
protokolanto
resumanto
multe da roloj, abunda rolado – ĉu ne estas baza kondiĉo de sukcesa fremdlingvo-instruado?

L kontinua rakonto de la enhavo
per propra vortumo, strukturo
konciza resumo
transpreni rolon de la unuopaj figuroj kaj en unua persono singularo
rakonti la okazintaĵojn

M rakonto de la enhavo kun individuaj epizodoj

N ŝanĝo de vortoj kaj esprimoj, idiomoj: sinonimoj, parolturnoj, stilistika ekzerco

O ŝanĝo de situacio, stilo, ĝenro; kompilo de sekundaraj tekstoj ekzemple kiel vi rakontus la samon al infano, al avino, al juĝisto, al la reĝo, al ofcisto, geografo, teknikisto ktp.

Diversaj teĥnikoj

a) Distranĉi tekston laŭ alineoj – kunmetigi ilin per la grupo, pridiskuti la vicordon
b) ellasi el la teksto gravajn elementojn, frazojn, datumojn – kompletigi la tekston
c) rekonstruado de teksto: laŭŝtupe forviŝi el la teksto la formajn elementojn: interpunkciadon, gramatikajn finaĵojn, prepoziciojn, konjunkciojn/subjunkciojn; poste la adjektivojn, adverbojn, objektojn; per la restintaj predikatoj kaj dinamikaj subjektoj ni rekreigu la originalan tekston (tio evoluigas ankaŭ la memorkapablon)
d) pliampleksigo de teksto – doni 8–10 aplikendajn esprimojn por manipuli la tekston: direktigajn, argumentajn, finajn/konkludajn, prijuĝajn esprimojn, parolturnojn
e) pliriĉigo de la teksto – grizan, simplan tekston fari interesa, dinamika, bildiga, ĝuebla legaĵo
f) koncizigo, selektado – ekzemple fari mallongan gazetartikolon pri la temo
g) priskribo de antaŭaĵo kaj sekvo de iu bildo aŭ sceno
h) interveno kun skeptikaj demandoj
i) oponado, defendo
j) akuzo–defendo
k) diskuto
l) protokolado

2.1 Jen mi prezentas tekston (ĉ. 415 silaban, 20 frazan), humuraĵon de hungara verkisto KARINTHY [karinti] Frigyes, por plenumi kelkajn paŝojn en la algoritmo de teksto-prilaboraj ekzercoj.

La tekston vi trovas ne en originala kontinuo (v. sur la apuda paĝo). Restarigi la vicordon estas la unua tasko (T).

T 2 Rezulte de reordigo de la alineoj ni ricevas la originalan tekston. Iu de la reordigintoj legu ĝin:

Kiel Kolumbo eltrovis Amerikon?

Al la hispana reĝo venis en la kapon la ideo, ke Ameriko devas esti eltrovota. Li venigis Kolumbon kaj demandis lin: „Kolumbo, ĉu vi povas eltrovi Amerikon?" – „Jes, mi povas!" – aŭdiĝis la respondo.

Post kelkaj tagoj Kolumbo jam iris en la ŝipon, tenante grandan ovon en la mano. Oni metis en la ŝipon ankaŭ la necesan provianton, kaj komenciĝis la historia ekspedicio.

Dum la tuta vojaĝo Kolumbo sidis en la kajuto kaj penis starigi sur la tablo la kunprenitan ovon. Post kelkaj semajnoj li fine sukcesis pri tio, kaj tuj la kapitano sciigis al li, ke Ameriko jam vidiĝas. „Mi scias – respondis Kolumbo –, ĉar la ovo jam staras."

Nun la ŝipo direktiĝis rekte al la lando kaj post nelonge ili jam venis al la bordo de Ameriko. Sur la bordo staris granda amaso da indianoj. Kolumbo kun sia sekvantaro iris el la ŝipo, iris en boaton kaj remigis sin al la bordo, kie la unuan fojon en la historio li starigis siajn piedojn sur la Amerika tero.

Li proksimiĝis al la indianoj kaj demandis ilin: „Ĉu vi estas indianoj?" Kaj la indianoj respondis: „Jes, ni estas indianoj. Sed ĉu vi estas Kolumbo?"

Ricevinte jesan respondon, la indianoj paliĝis kaj ekkriis: "Ho ve! Nun ni estas eltrovitaj!"

T 3 Ni klarigu leksikon kaj gramatikon laŭbezone, mallonge A
T 4 Ni korektu prononc-erarojn, se necese B
T 5 Sekvu oratora legado fare de volontulo, kun gestikulado E
T 6 Iu prezentu la tekston libere, parkere J
T 7 Demandu – respondu! K

ping-pong' ekzemple:
Kion oni metis en la ŝipon?
La necesan provianton...

gamo de demandoj, ekzemple:
Kiujn trovis Kolumbo en Ameriko?
Kion ili interparolis?
Kial la indiĝenoj paliĝis?

disbranĉigaj demandoj, ekzemple:
Al kiu venis la ideo malkovri Amerikon?
Kiu estis la hispana reĝo en tiu tempo?

Kiam li regis?
Kiuj politikaj eventoj okazis samtempe en Eŭropo?
Kiu estis la edzino de la reĝo?
Ĉu ŝi havis rolon rilate al la ekspedicio? ktp. ktp.
Kion Kolumbo tenis en la mano enirante la ŝipon?
Kion ni scias pri la „Kolumba ovo"? ktp.

Katalizatoraj demandoj (al unu demando du-trifraza respondo), ekzemple:
Kiel komenciĝis la historia ekspedicio? aŭ
Kio okazis, kiam la kapitano vidis, ke la ŝipo proksimiĝas al Ameriko?
Pridemandadu Kolumbon!

T 8 *Kiel rakontas la okazintaĵojn matroso al sia filo hejme?* L M
Kiel rakontas la historion Kolumbo al la reĝino?

Kiel Kolumbo eltrovis Amerikon?

Nun la ŝipo direktiĝis rekte al la lando kaj post nelonge ili jam venis al la bordo de Ameriko. Sur la bordo staris granda amaso da indianoj. Kolumbo kun sia sekvantaro iris el la ŝipo, iris en boaton kaj remigis sin al la bordo, kie la unuan fojon en la historio li starigis siajn piedojn sur la Amerika tero.

Al la hispana reĝo venis en la kapon la ideo, ke Ameriko devas esti eltrovota. Li venigis Kolumbon kaj demandis lin: „Kolumbo, ĉu vi povas eltrovi Amerikon?" – „Jes, mi povas!" – aŭdiĝis la respondo.

Dum la tuta vojaĝo Kolumbo sidis en la kajuto kaj penis starigi sur la tablo la kunprenitan ovon. Post kelkaj semajnoj li fine sukcesis pri tio, kaj tuj la kapitano sciigis al li, ke Ameriko jam vidiĝas. „Mi scias – respondis Kolumbo –, ĉar la ovo jam staras."

Li proksimiĝis al la indianoj kaj demandis ilin: „Ĉu vi estas indianoj?" Kaj la indianoj respondis: „Jes, ni estas indianoj. Sed ĉu vi estas Kolumbo?"

Ricevinte jesan respondon, la indianoj paliĝis kaj ekkriis: "Ho ve! Nun ni estas eltrovitaj!"

Post kelkaj tagoj Kolumbo jam iris en la ŝipon, tenante grandan ovon en la mano. Oni metis en la ŝipon ankaŭ la necesan provianton, kaj komenciĝis la historia ekspedicio.

T 9 Ni ŝanĝu en la teksto N

vortojn	sintagmojn, strukturojn
eltrovi	venis en la kapon la ideo
provianto	tenante grandan ovon en la mano
kapitano	iris en la ŝipon
amaso	la kapitano sciigis al li, ke Ameriko jam vidiĝas
sekvantaro	la ŝipo direktiĝis al...
eltrovitaj	

T 10 Kian tonon havas la teksto? — humuran

Kio kaŭzas la humuron? — anakronismo, ŝanĝo de kaŭzo kaj sekvo, nereala situacio ktp.

Kial ne povis la reĝo demandi: „Ĉu vi povas eltrovi Amerikon?"
Kion povis raporti la kapitano al Kolumbo?
Ĉu la dialogo inter Kolumbo kaj la indianoj povis okazi (tiel)?
Se ne, kial ne?
Ĉu indianoj paliĝas?
Kial la indianoj diris „Ho ve!"? ktp.

T 11 Oponu rilate al kelkaj asertoj de la rakonto!

T 12 Iu/j protokolu la oponadon–defendadon!

T 13 Ni diskutu: Kiel okazis la malkovro de Ameriko efektive!

T 14 Hejma tasko: Skribu ŝip-taglibron! O

Sendu raporton pri la malkovro de Ameriko al novaĵ-agentejo!

T 15 Ni aŭskultu kaj prijuĝ u la protokolojn kaj la hejmajn taskojn!

3. Por trapasi ĉiujn ŝtupojn en la procezo de la tekstoprilaboro ne sufiĉas 3–4–5 instruhoroj, kiom kutime estas dediĉataj por unu leciono. Oni povas plilongigi la procezon kaj prilabori plurajn tekstojn samtempe kun iom da fazodiferenco.

Ne necesas ĉiun teksto prilabori laŭ ĉiu vidpunkto, sed gravas, ke sume ĉiu maniero estu aplikata.

Ne ĉiun fazon kaj ekzerco-formon devas ĉiu lernanto pri ĉiu teksto trairi, ni dividu la taskojn inter la grupanoj, sed ĉiu lernanto aŭskultu la aliajn.

Ne ĉiujn taskojn ni devas plenumigi dum studhoroj, ja ankaŭ por la hejmo ni povas taski la lernantojn. Sed raporto devas esti en la studhoroj pri la faritaj taskoj.

Dum tiu ekzerco-ĉeno malkovriĝas fortaj kaj malfortaj punktoj en la komunikaj kapabloj ĉe la lernantoj. Per adekvataj taskoj ni evoluigu la postrestintan kampon.

28a ILEI KONFERENCO

Universitato Kangnam, Koreio 30a de julio - 5a de aŭgusto 1994

LKK-adreso: D-ro So Jin Su, adreso sur la dua kovrilpaĝo

Jen kompletigaj informoj ricevitaj el Koreio. Vidu la ĉefan informilon kaj aliĝilon sur la flavaj mezaj paĝoj de IPR 93/2.

Temo: Ĝi estas reformulita jene: 'La aziaj edukado kaj kulturo.'

Loĝado: Ĉiuj partoprenantoj uzos la saman loĝejon, kiu estas koreastila gastejo kun du specoj da ĉambroj — kun kaj sen litoj (supozeble surbambutapiŝa dormado laŭ korea stilo.) La ĉambroj havas proprajn necesejon kaj duŝojn. Principe du personoj okupos unu ĉambron. Kiu volas okupi ĉambron sola krompagos. La gastejo troviĝas 1 km for de la universitato, atingebla en 5-10 minutoj per ofta publika bus-servo.

Manĝoj: En Koreio hoteloj kaj gastejoj ne provizas matenmanĝon. LKK planas havigi al konferencanoj ĉiujn manĝojn en la universitata manĝejo. Ĉiuj manĝoj estas koreastilaj. Oni povas aĉeti panon (ankaŭ brunan), fromaĝon, fruktojn kaj similaĵojn en apudaj vendejoj.

Kotizo: Tio inkluzivas loĝigon, programon, ekskurson kaj tri manĝojn tage. Loĝantoj de okcidenta Eŭropo, Nord-Ameriko, Japanio, Koreio kaj Aŭstralazio pagos 150.000 ŭonojn, t.e. 190 USD, 370 NLG aŭ 1500 SEK.

Sola okuponto de ĉambro krompagos 60.000 ŭonojn (75 USD). Loĝantoj de aliaj mondpartoj ĝuos mildigon de 20% (ekzemple 17.000 HUF en Hungario). Moralaj partoprenantoj estas bonvenaj kun siavola pago. Pri aliĝo kaj pagovojoj vidu la mezajn flavajn paĝojn de IPR 93/2.

Programeroj: Partoprenontoj praktikos kaligrafion, koreajn lingvon, arton kaj kulturaĵojn. LKK planas okazigi altrangan metodikan programon speciale por koreoj kaj japanoj.

Gimnazio: Gia okazigo estas necerta. Sekcioj ricevos informojn rekte.

Alveno: Partoprenontoj bv. anonci sin al la ILEI-budo en la UK. Oni komune veturos al la konferenco aŭtobuse. Se iu planas alveni memstare, bv. kontakti d-ron So Jin Su (adreso, dua kovrila paĝo) anoncante vian alveturan direkton, por ricevi navigajn klarigojn.

Atentu, ke la konferenco **ne** okazos en la montar-regiona ejo prezentita lumbilde en Valencio, sed en la universitato de la urbo Kangnam ĉ. 30 km. sude de Seulo, laŭ la pli frua plano kaj kiel skribe anoncita en IPR 93/2. La loĝigaj informoj kaj prezoj tie donitaj **ne plu validas**, kaj la supraj anstataŭas ilin.

Por praktikaj kaj kulturaj informoj pri Koreio, kaj pri avantaĝaj flug-karavanaj eblecoj, vidu la januaran numeron de revuon *Esperanto*.

SERĈOJ EL SOĈI!

En tiu rusa urbo ĉiuj triaj klasoj de mezlernejo N22 eklernis Esperanton ekde septembro 1993 kadre de internacia eksperimento; instruas Nina Piroĵnaja. Plia kvindeko lernas en urba klubo. Ili deziras korespondi tutmonde. Skribu al: E-klubo 'Laro', ab. jas. 913, RUS-354000 Soĉi. Tel. (862) 99-72-281; Fakso: (8622) 92-04-45.

Memoru, ke *Juna amiko* ĉiunumere prezentas kontaktojn el ĉiuj mond-anguloj!

ESTRARKUNSIDO:

Telegrame el Berlino

Inter la 11a kaj la 13a de marto 1994 kunsidis la eŭropaj estraranoj de ILEI (d-ro T. Dahlenburg, B. Andreasson, M. Belosevic) kun du estraraj komisiitoj (s-ino Barcsay Zs. kaj S. MacGill). Sekcioj ricevos de la sekretario la plenan protokolon, sed la malfruiĝo de ĉi tiu IPR permesas almenaŭ *maloficialan kaj eble subjektivan* telegram-stilan raporton pri kelkaj ĉefpunktoj. Do, la estraro...

- trastudis postularon por la supera ekzameno, kiun verkis TD, kaj kiun ILEI prezentos al UEA post iom da ŝanĝoj, ĉefe por konsekvencigi ĝin kun la ekzistanta regularo.
- eksciis, ke UEA redonis al ILEI la taskon trovi du pliajn prezidantojn kaj funkciigan sekretarion por la supera nivelo, kaj ĝi plue serĉos tiujn.
- tralaboris proponon de MB pri internaj gvidlinioj por pli efika funkciado de la estraro, ekz. rilate al voĉdonado, observo de limdatoj kaj pli klara disdivido de taskoj. Klaras, ke la estraro devos repreni plurajn taskojn ĝis nun faritajn en Budapeŝto, kaj ke la rolo de la sekretario tiurilate devos signife fortiĝi.
- aŭdis, ke la jara spezaro por 1993 antaŭvideble havos deficiton inter 15.000 kaj 20.000 SEK, sed klara finkalkulo ankoraŭ ne estas konebla.
- eksciis plie de BA, ke la enhavo de Fondaĵo Szerdahelyi falis dum 1993 de ĉ. 30.000 SEK ĝis 5.000 SEK, sekve en 1994 eblecoj por stipendiado kaj subvenciado estas tre limigitaj.
- ĝojis, ke instruistaj kursoj en 1994 povos okazi en KCE, Kvinpetalo kaj SFSU en San-francisko.
- ricevis informojn pri la planata partopreno de ILEI (TD) kune kun GEA en la 18a Monda Kongreso de Lingvo-Instruistoj en Hamburgo fine de marto.
- informiĝis pri la konferenco en Kangnam (kiel vi ĵus faris sur la antaŭa paĝo — tiujn informojn cetere ni sendas rekte al sekciestroj pli frue ol la apero de ĉi tiu IPR). La kunsidojn de ILEI en Kangnam gvidos prof. Ronald Glossop, asistata de la sekretario. Pri la partopreno de estrarano prof. Zhang Danchen ILEI forte esperas kaj konkrete subtenas. Partopreno de la kasisto estas necerta. Ceteraj estraranoj certe ne povos ĉeesti.
- konstatis la neceson starigi elekto-komisionon aŭ -iton por la rotaciaj estrar-elektoj en Kangnam, kie du estraranoj retiriĝos kaj almenaŭ unu ne rekandidatiĝos — komplikaĵo estas la necerta akiro de kvorumo en la komitato. Kiu volas proponi sin aŭ iun alian por la estraro aŭ kiel elekto-preparanton, bv. anonci sin!
- eksciis de BA pri glataj preparlaboroj por la 29a konferenco en Finnlando, kaj inspektis du proponatajn ejojn, ambaŭ tre taŭgaj kaj allogaj el ĉiu vidpunkto krom la preza! BA provos eltrovi malpli kostajn eblecojn antaŭ la fina decido.
- ricevis de SMG ekzemplerojn de *Tendaraj tagoj III*, rekte kaj preskaŭ ankoraŭ varmaj el la presejo.
- akceptis la proponon de la redakcio de IPR aperigi duoblan numeron 94/1-2 por rekapti la aper-ritmon.
- studis la artikolon de la antaŭa prezidanto (vidu paĝojn 23-28) pri laborfortoj kaj konstatis ĝian aktualecon kaj influon sur pluraj agad-terenoj. Konkrete pri la bezono por iuspeca (honorariata) Konstanta Konferenca Sekretario en ILEI, leviĝis la ideo ne okazigi konferencon ĉiujare, sed fari tion nur ĉiun trian jaron en loko, kie la organizado estos nepre firma, partopreno abunda kaj kvorumo certa. En la ceteraj jaroj okazu regionaj pedagogiaj aranĝoj (similaj al IMS) en diversaj mondpartoj, por tiuj multaj instruistoj, kiuj neniam povas vojaĝi al la UK. Tiujn foje organizu ILEI de-centre kun aktiva LKK (kiel la nunaj konferencoj), foje organizu iu E-Centro aŭ grupo de sekcioj, kaj la centra ILEI nur aŭspicios, donos fakan helpon kaj diskonigon sen multa organiza aŭ financa interveno. Oni konstatis, ke ligi la konferencojn al UK donas certan publikon, sed ĝi tendencas esti la sama publiko. Ĉiuokaze, tiu tuto venis nur al fru-diskuta fazo, nur post reeĥoj de la membroj kaj sekcioj ĝi eventuale atingos maturecon por decido (kaj statut-ŝanĝo!!)

La kunvenintoj gastis en kunveno de berlinaj esperantistoj, kie post sinprezentoj ambaŭflanke disvolviĝis vigla diskuto pri edukaj projektoj kaj prioriatoj. ILEI kore dankas al d-ro Dahlenburg pro la surloka organizado, veturigo kaj loĝigo, ankaŭ al li kaj s-ro Ulrich Becker pro la disponigo de tre konvena urbocentra kunvenejo.


Telegramis: smg.

MALOFICIALE ANTAŬKONGRESU EN USONO!

Elektu inter Esperanto-Klasoj kaj Ekskursoj:



8-16 julio - Universitato de Hartford, Connecticut
Prezidanto: d-ro Humphrey Tonkin
Instruistoj: Spomenka Štimec, Boris Kolker
Proks. prezo: US$407 inkluzivas la klasojn, loĝadon en la universitato, du tut-tagajn ekskursojn al Novjorko kaj Bostono, piknikojn kaj programojn ĉe la universitato (manĝoj **ne** inkluzivitaj).



9-15 julio - San Francisco Ŝtata Universitato
Instruistoj: d-ro Duncan Charters, Stefan MacGill.
Proks. prezo: US$487 inkluzivas la klasojn, loĝadon en la universitato, tri manĝojn tage, ekskursojn kaj abundan programon ĉe la universitato.

POST LA KLASOJ, ĉiuj iru al la Usona landa kongreso de Esperanto en Sacramento, la ĉefurbo de Kalifornio. La programo inkluzivas prelegojn, distraĵojn kaj ekskursojn, finiĝas en San Francisco el kie oni kune flugos al Seulo kaj la Universala Kongreso. La Kongresa Temo estas:

VENU, VIDU, RIDU, ĜOJU INTER NI.

Eŭropaj kaj Aziaj Esperantistoj povas uzi la tarifon "Vizitu Usonon" por flugoj ene de Usono, aŭ aĉeti ĉirkaŭmondan bileton. TWA kaj Korean Air vendas la plej malmultekostan kombinaĵon. Detaloj pri la klasoj, ekskursoj, kaj flugoj haveblaj de

Esperanto Vojaĝ-Servo
6104 La Salle Ave., Oakland CA 94611 U.S.A.
☎ +510-339-2001, Fax +510-339-6317.

BENELUKSE

La nederlanda sekcio organizos la ĉiujaran studo-tagon en sabato, la 8a de oktobro 1994 en la IEI-sidejo en Hago. S-ro Claude GACOND el Svislando parolos pri didaktika temo.

La nederlanda, belga kaj germana sekcioj planas organizi frue en 1995 komunan porinstruistan seminarion apud ilia tri-landa punkto. Direktu interesiĝon pri partopreno aŭ organiza kunlaboro al la nova nederlanda sekciestro (adreso tria kovrilpaĝo).

(El NGGE sciigas feb 94)

PEDAGOGIAJ ARANĜOJ

Aprilo

23-1.05 Internacia Renkontiĝo de Infanoj, Kastelo Grésillon.

29.4-1.5. Homburgo. 43a Kultura Semajnfino de la Sarlanda E-Ligo. Enkonduka kurso gvidota de Barbara Jantzen. Kresimir Barkovic gvidos parolajn kaj legajn ekzercojn por progresintoj. Eddy Borsboom aranĝos stilistikajn kaj literaturajn ekzercojn. Inf: SEL, Querstr. 11, D-66287 Quieschied, Germanio, tel. O6897 6242.

Junio

6-1O. Andrzej Pettyn gvidos E-kursojn por komencantoj kaj progresintoj en la somera universitato en Turku. Inf: E-societo, Tiina Oittinen, Puutarhakakatu 26 A 11, FI-20100 Turku.

13-18. Naŭa kvarnivela Somera E-kurso kun speciala metod-lingvo-kurso por lingvoinstruistoj. Instruisto Georgo Handzlik. Inf. Karskoga Popola Altlernejo, gvidanto Lars Forsman, Fako 192, S-691 24 Karskoga, Svedio. tel. 0586-5O3 6O, fakso: 370 77.

Junio/Julio

25-2.07. Didaktika seminario en Limanowa, Pollando. Inf. pola ILEI-sekcio, Hanna Kwasniewicz, ul. Wieniawskiego 10/48, PL-43-110 Tychy; tel. 118 67 14.

27.O6 - 15.07. E-kursoj ĉe la Ŝtata Universitato en Sanfrancisko. instruos d-ro Duncan Charters, Stefan MacGill (kursotekstoj *Tendaraj tagoj* kajeroj du kaj tri) kaj Joachim Werdin, kun aparta emfazo al didaktiko kaj instru-teknikoj. Reginald Jaderstrom redaktos la kurs-bultenon. Info: Cathy Schulze, Esperanto-Informcentro, 41O Darrel Rd. Hillsborough, CA 94O1O-671O. Usono. (HdeE). *(Vidu la vojaĝ-oficejan informon)*

Julio

3-16. Somera Esperanto-Lernejo, Poprad. Inf. E-Centro de SEA, Sobotské nam. 6, SK-058 01 Poprad, Slovakio. (ripeto 7-20 aŭg.)

4-10 Somera Universitato kaj E-klubo Jyväskyllä. 27-an Someran E-studsemajnon, diversgradan. Instruistoj kaj ekzamenontoj Zsuzsa Barcsay kaj d-ro Till Dahlenburg. Inf: s-ino Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, FI-40630 Jyväskylä, Finnlando. (HdeE).

7-12 Bouresse, Francio. Kurso por instruistoj, gvidas Katalin Smidéliusz. Adreso: La Kvinpetalo, Contre Esperantiste, Rue de Civaux, F-86410 Bouresse, Francio, tel. O1O-33-49-428O74.

9-15. Eŭropa Esperanto-Festivalo, Budapeŝto. Inf. HEA, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

10-15. 30a Brazila Kongreso de Esperanto, Natal. Inf. Asocio Potigvara de Esperanto, Caixa Postal 291, BR-59001-000 Natal.

15-20. IMS, Tallinn, Estonio (v. p. 17-18).

15-22. Intensiva pretiĝo al la ekzamenoj UEA/ILEI kun prelegoj pri la metodiko de E-instruado. KCE, Svislando. Gvidos Katalin Smidéliusz el Hungario..

23-30. 79a Universala Kongreso de Esperanto, Seulo, Koreio. (Inf. UEA)

30-6.08 50a Internacia Junulara Kongreso, Chonan, Koreio. (informoj de UEA)

30-5.08 28a Konferenco de ILEI, Kangnam, Koreio. (vidu p. 13).

31-5.08 Lingvokursoj por komencantoj kaj progresintoj. KCE., Svislando.

27.08-14.1O komencanta kaj 24.10-2O.12 Progresinta kursoj en Karskoga, Svedio.

Aŭgusto

1-10 Eŭropa Skolta Ĵamboreo, Dronten, Nederlando. Skolta Esperanto-Ligo organizos partoprenan grupon. Samloke unu jaron poste okazos la Monda Ĵamboreo. Inf. Arie Bouman, Diesdreef 8, BE-9030 Gent, Belgio. (el *La skolta mondo*)

21.8-3.9 Esperanto Centro Gresillon, Kurso por instruistoj Adreso: Kultura Esperanto-Domo, Gresillon, F-4915O Bauge, Francio. Tel. O1O-41-891O34.

Oktobro

8an. Studotago de NGGE en Den Haag. (vidu la antaŭan paĝon).

23-28 Lingvo-kursoj por komencantoj kaj progresintoj. KCE.

Povos okazi tritaga instruista kurso en Budapeŝto aŭtune pri la uzo de la tria kajero de *Tendaraj tagoj*, se estas interesiĝo.

Por pli plenaj kalendaroj, vidu la martan numeron de revuo *Esperanto* aŭ la koncernan numeron de Heroldo. *Eventoj* regule aperigas informojn pri aranĝoj.

KCE en La Chaux-de-Fonds, Kastelo Grésillon kaj Kvinpetalo en Francio, Monda Turismo en Bydgoszcz, EC en Poprad kaj pluraj aliaj okazigas aranĝojn tra la jaro. Petu iliajn plenojn programojn de ili!

Kompilis MB/SMG

Temoj de la deka Internacia Metodika Seminario

IMS, Viljandi, Estonio, 14-21 julio 1994.

sub la aŭspicio de ILEI

1) Spertoj pri intensaj lingvo-kursoj (kun tia kurso paralele organizita)

2) Pedagogia terminologio

Dum la oka IMS en Litovio montriĝis granda intereso pri *intensaj lingvokursoj* por junuloj kaj plenaĝuloj, tial ni deziras esplori tiun ĉi temon en la venonta IMS en Viljandi(urbo kun 25.000 loĝantoj), en Estonio.

Pli kaj pli disvastiĝas t.n. celkursoj, kiuj ne volas – eĉ ne povas! – havigi kompletan lingvoscion (kompetenton kaj performancon), sed elektas iun celon, ekz. klarigi la fundamentan gramatikon, aŭ kompari la strukturon de Eo kun alia(j) lingvo(j), aŭ kapabligi legi fakliteraturon, aŭ doni ŝlosilon al ĉiutaga aŭ speciala konversacio, instruante sintagmojn, pretajn parolelementojn ktp. ktp. Tiaj kursoj preparas la kursanojn je diversaj situacioj (ekz-e fariĝi helpanto en UK k.s.), aŭ je celekzamenoj.

Intensaj kursoj estas ege variaj, diversspecaj kaj ili bezonas iom specialajn studmaterialojn, metodojn kaj rimedojn, sed ankaŭ variajn psikologian aliron.

Montriĝas bezono, kaj sekve ankaŭ intereso, ke ni interŝanĝu spertojn pri tio: ni analizu la motivojn, kolektu materialojn, ideojn, prezentu la praktikajn manierojn kaj reale kaj realisme taksu la atingeblajn rezultojn de tiaj kursoj.

Por havi praktikan fundamenton por la diskutoj pri la supra temo, estos gvidata samtempe kaj samloke kvartaga intensa paroliga kurso por maksimume dudek personoj, kiuj dekomence lernos Esperanton. Mov-handikapuloj kaj blinduloj estas kore atendataj en ĉu la kurso ĉu la seminario.

La neceso de *faka terminologio* ne bezonas apartan argumentadon: por interkompreniĝi inter samfakuloj ne sufiĉas paroli la saman lingvon, sed necesas paroli en la sama faka lingvo. Gravas, ke ni havu normigitan fakan terminaron pri pedagogio, didaktiko, metodiko, alie ni ne povas scii, kiu kion komprenas sub *instrumetodo, -maniero, -procezo, -vojo, -rimedo, -teĥniko* k.s., aŭ *metodiko, metodologio, lingvo-pedagogio, glotodidaktiko* ktp. Diversaj verkistoj (Rakusa, Szerdahelyi, Szanser k.s.) atribuas ne la saman signifon al la samaj vortoj. Sporade jam ekzistas klopodoj por la normigo, sed venis la tempo ke decidu la kolektiva prudento. Do, koran inviton al la deka IMS!

ims



Konferencejo: La Unua Urba Gimnazio de Viljandi.

Konferenca kotizo: 20 USD aŭ ekvivalento por reform-eŭropanoj; 50 USD aŭ ekvivalento por aliaj. Tiun sumon, kaj tiun por la loĝigo oni pagu surloke.

Unua manĝo: 14a de julio, ĵaŭde, vespermanĝo. **Lasta manĝo:** 21a, ĵaŭde, matenmanĝo. Aliĝintoj kaj interesatoj ricevos informojn pri la seminaria adreso, atingeblo kaj programo. Eĉ se vi ne certas pri via partopreno, bv. anonci vin per la aliĝilo, kiu samtempe estas petilo por pliaj informoj.

LOĜIGO okazos diversloke; ĉu turisma hejmo (amas-loĝejo), enfamiliaj loĝejoj aŭ hoteloj, je tranokta prezo de 3 ĝis 15 USD. Manĝado okazos en restoracioj laŭ surloka mempagado.

VIZOJN bezonas ŝtatanoj de Belgio, Ĉinio, Finnlando, Francio, Greklando, Hispanio, Italio, Nederlando, Norvegio, Portugalio, Rusio kaj Svedio.

PROGRAMO: Kontribu-proponojn por la programo sendu al ILEI, D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, DE-19412 Brüel, Germanio, tel. (+ +49 38483) 528. Prezentaĵoj daŭru prefere ne pli ol 30 minutojn. Laŭeble kontribuantoj ricevos mildigon de la seminaria kotizo. Laŭeble kunportu E-lernilojn (librojn, kasedojn ktp.) por ekspozicio.

ALIĜILO / ANONCILO AL LA DEKA IMS

Sendu al: S-ino Barcsay Zsuzsa, Bem Rakpart 25 B, H-1011 Budapest, Hungario;
tel. (++ 36 1) 201 2342. (sendu samloke ankaŭ la apudan libromendilon, se dezirate)

Nomo: .....

Adreso: .....

Sekso: ..... Profesio: ..... Naskiĝdato: .....

Loĝigo: ____ Hotelo/ ____ Familia domo/ ____ Turisma hejmo.

Mi deziras dividi ĉambron kun: .....

Mi havas apartan dietan peton, nome: .....

Mi estas handikapulo je movo/vido, sed kun iom da helpo mi estas memstara/ mi bezonas speciale: .....

Mi deziras kontribui al la programo jene: .....

.....

☐ Mi aliĝas al la deka IMS. Bv. sendi plenajn informojn.

☐ Mi aliĝas al la intensa komencanta lingvo-kurso paralela al la IMS

☐ Bonvolu sendi al mi pli da informoj pri la IMS kaj la lingvo-kurso.

☐ Bonvolu sendi al mi invitleteron por akiro de vizo.

Subskribo: ..... Dato: ..... Loko: .....

LIBROSERVO DE ILEI

Sendu al: ILEI, Bem Rakpart 25B, H-1011 Budapest, Hungario. (93/4)

Nomo: .....

Adreso kien sendi la librojn: .....

.....

Mi mendas la sekvajn titolojn:	**Kvanto**	**Sumo**
Teorio kaj Praktiko de Lingvo-Instruado .(Mag. I. Szanser, 174 p.) 24 NLG/ 96 SEK (po 18 NLG ekde 3 ekz.)	_____	_____
La danĝera lingvo, Lins. 36 NLG/150 SEK	_____	_____
Slovakia antologio (528p.) 20 NLG/ 80 SEK	_____	_____
Anekdotoj pri famaj homoj (60p.) 13 NLG/ 50 SEK	_____	_____
Spegulaj E-insignoj el Kievo. 2 NLG/ 8 SEK	_____	_____
Jarkolekto de *Juna amiko* por 1992. 8 NLG / 32 SEK	_____	_____
Jarkolekto de *Juna amiko* por 1993. 10 NLG / 40 SEK	_____	_____
Abono *Juna amiko* por 1994. 16 NLG/ 50 SEK (petu pri rabatoj por kvantoj kaj nacilingvaj kotizoj)	_____	_____
'Valoro de Esperanto' (Symoens, angle) 6 NLG/ 20 SEK	_____	_____
'Valoro de Esperanto' (Symoens, france) 6 NLG/ 20 SEK	_____	_____
Sola en sunsubiro (Tvarozek 60p.) 6 NLG / 18 SEK	_____	_____
Ĉernobil (Ŝĉerbak) 389p. 8 NLG/ 24 SEK	_____	_____
Impeto 91 (Progreso) 246p. 6 NLG / 18 SEK	_____	_____
SUMO:	_____	_____

Subskribo: ..... Dato: ..... Loko: .....

Ne antaŭpagu la mendojn. Ni sendos fakturon kun la libroj. Fakturoj estos en nederlandaj guldenoj kaj svedaj kronoj. Nederlandajn pagojn oni povas fari al la konto de ILEI, ilek-a ĉe UEA. Svedkronajn pagojn oni povas fari al nia kasisto. La fakturoj donos plenajn pag-detalojn. Niaj prezoj *inkluzivas* la surfacajn ekspedokostojn. Se vi volas aerpoŝtan liveron, necesos aldoni 30%. Ni petas pagojn ene de 30 tagoj de ricevo de la varo. Bv. pacienci pri liveroj de *Teorio kaj praktiko...* ĉar la stoko kuŝas en Litovio, ne Budapeŝto.

Notu, ke la supra adreso **ne** estas tiu de la libroservo. Ni permesas al vi ĉi-foje uzi ĝin, nur pro la samfolia aliĝilo al IMS, por ŝpari al vi afrankon kaj apartan laboron.

SUBTENU LA LIGAN LIBROSERVON! NI ATENDAS VIAJN MENDOJN!

ILEI anoncas kompletigon de la lernolibra serio

Tendaraj tagoj

per la apero de la tria kajero.



Ĉi tiu serio celas helpi al unuavice 10- ĝis 14-jaruloj lerni Esperanton sub la gvido de instruisto. Ĝi vivigas la situaci-komunikan aliron al lingvo-lernado – dialogoj, ekzercoj kaj rol-ludoj spronas konversaciadon en Esperanto.

Vidu pli kompletan prezenton de la verko aliloke en la numero. Ni invitas mendojn, ĉu ĉe UEA aŭ aliaj libroservoj, ĉu ĉe ILEI per la suba mendilo.

- Ĉe UEA la prezo estas 18,00 NLG. (15 NLG por la dua kajero kaj 12,00 NLG por la unua). Ĉiukaze kun triona rabato ekde tri ekzempleroj, plus 10% por sendokostoj.
- Ĉe ILEI la subaj prezoj inkluzivas la surfacajn sendokostojn, kaj ni donas rabaton por samtempa mendo de ĉiuj tri kajeroj samtempe: anstataŭ 45 NLG, vi pagos 39 NLG. por unu kompleto. La unua kajero ĉiam temos pri la reviziita kaj ampleksigita dua eldono, aperinta en 1993.

KIOM	KAJERO 3	KOMPLETO	KIOM	KAJERO 1	KAJERO 2
Unu ekz.	18 NLG 75 SEK	**39 NLG 160 SEK**	Unu ekz.	12NLG 50SEK	15NLG 60 SEK
Ekde 4 po	12 NLG 50 SEK	**29 NLG 120 SEK**	Ekde 5 , po	8NLG 35SEK	10NLG 40SEK
Ekde 12 po	11 NLG 45 SEK	**25 NLG 100 SEK**	Ekde 15 , po	7NLG 30SEK	9NLG 35SEK

Tendaraj tagoj, kajero III, Stefan MacGill. ILEI, Budapeŝto, 1994. 29 cm. 76p. Broŝ. kun plastumita kovrilo. Ilus. Pavel Rak. ISBN 963 04 3957 03 (tria kajero); ISBN 963 04 1162 0 ö (la kompleto). Prezo: 18 NLG.

MENDILO

Mi mendas de ILEI, Bem Rakpart 25B, H-1011 Budapest, Hungario:

_____ ekz. de la tria kajero de *Tendaraj tagoj* po _____ = _____

_____ ekz. de la dua kajero de *Tendaraj tagoj* po _____ = _____

_____ ekz. de la unua kajero (dua eldono) po _____ = _____

_____ ekz. de la tri-kajera kompleto po _____ = _____

Ne sendu pagon anticipe. Ni sendos kun la libroj fakturon kun precizaj pag-instrukcioj (guldene al UEA aŭ sved-krone al la kasisto de ILEI). Ni petas pagon ene de 30 tagoj. Skribu viajn nomon kaj plenan poŝtan adreson dorsflanke, kaj aldonu vian subskribon kaj la daton. Vi povas sendi ĉi tiun mendilon kaj tiun por la IMS samkoverte al la donita adreso en Budapeŝto.

Gvidata promeno tra *Tendaraj tagoj III*

KIA ĴONGLADO!



Saluton! Mi estas aŭdaca akrobato! Mi aperas en la tria kajero de *Tendaraj tagoj*. Tie, mi vizitas cirkon kaj montras miajn mirindajn talentojn, ĉar mi serĉas laboron, kiel multaj homoj nuntempe. Mi devus facile ricevi postenon, ĉar mi estas tre lerta ĵonglisto. La cirkestro estas imponita kaj preta dungi min ... ĝis ...ĝis ...nu, tiu estas alia rakonto ... legu mem.

Mi estis taskita de la aŭtoro tie enkonduki la uzon de la **-N** finaĵo por indiki movon **al**. Vidu, mi prenas tason kaj metas teleron sur ĝin. Sur la teleron mi metas glason, kaj sur ĝin mi ĵetas arakidon.


Tra la tuta libro, ni roluloj ĵonglas la situaciojn kaj la gramatikon, por ke la lernantoj kiel eble plej frue povu komuniki. Mi mallonge gvidos vin tra la tria kajero, kies baza situacio estas internacia Esperanta tendaro.

Komence, ni prezentas skriban komunikadon – kelkajn modelajn leterojn kaj poŝtkartojn, per kiuj la tendaranoj akiris siajn unuajn korespond-amikojn. Poste, restarigo de tendoj instruas la refleksivon, fabela parodio memorigas pri la uzoj de **-ig-**, vizito de mond-vojaĝantoj al la tendaro malfermas la mondon de la Pasporta Servo de TEJO. Tiam ni atingas mian parton de la libro: **en la -ON** kaj **sur la -ON.** Unue ni vizitas karton-fabrikon kaj butikon, due Iŝtvano prezentas kuir-receptojn, trie mi vizitas la cirkon, kie... ho, ve!

La uzon de **-IĜ-** oni montras per tendara ekskurso al ravino. Unue, necesas aŭskulti la veter-prognozon, por scii ĉu la vento mildiĝos, poste ĉiuj enbusiĝas, kaj la aventuro komenciĝas. La tendaranoj kanote trairas la ravinon, sed ĉiu surpriziĝas, ĉar ... nu, legu mem!


Poste la fama spiono 005 kaj la ĉefo Z (konataj el la dua kajero) planas mision repreni la Unuan Libron de Esperanto el Volapukistano. Ni malkovras kelkajn aliajn sekretajn projektojn de Z, kaj fine ekscias, ĉu la misio en Volapukastelo sukcesos aŭ ne.

Laste, eksterteranoj vizitas la teron, kaj multaj NIFOj estas raportitaj. La tendaranoj informiĝas pri la Infana Kongreseto, la Gimnazio de ILEI, la IJK kaj UK kaj aliaj aspektoj de la esperanta mondo. Ne eblas rakonti pri ĉio, sed la lasta evento estas adiaŭa rost-festo apud la rivero.



Kun 76 paĝoj, la tria kajero multe pli dikas ol la antaŭaj, ne tiom pro multa gramatiko, sed pro abundo da firmigaj legaĵoj kaj ekzercoj. Pro la pli varia kaj interesa enhavo (kun roluloj kiel mi, ekzemple!) ajn-aĝaj lernantoj povos uzi ĉi tiun trian kajeron por progresiga kurso.

Sur la antaŭaj paĝoj vi trovos elprenteblan mendilon per kiu vi povos akiri la kajeron, kun rabato por kvantoj kaj por samtempa mendo de la tri-kajera kompleto. Kaptu la okazon! Konatiĝu kun mi, kaj eksciu, kial mi ne dungiĝis!



KALENDARO POR LA INTERNACIAJ EKZAMENOJ EN 1994

(elementa kaj meza niveloj)

marto 31 - aprilo 4: Argentino. Informoj de la argentina sekcio.
majo 20-21. Zagrebo, Kroatio. Informoj de la kroatia sekcio.
julio 8-10. Jyväskylä, Finnlando. Informoj: S. Kettunen, Keihasmiehenkatu 3, FI-40630 Jyväskylä, Finnlando.
julio 23.-24, La Chaux-de-Fonds, KCE, Svislando. Kun preparkurso antaŭe.
julio 8-9, San-francisko, Usono. Informoj de la SFSU-kursaro (vidu informojn aliloke).
julio 25-28 Seulo, Koreio. Registriĝo en la kongresa mardo, skriba ekzameno ĵaŭde, parola parto vendrede.
aŭguste, Barlastono, Britio. Kontaktu la britan sekcion.
oktobro 8, Bruselo, Belgio. Informoj: kontaktu la belgan sekcion.
decembro 11-12 Zagrebo, Kroatio. Informoj de la kroata sekcio..
decembro 15-31. Accra, Ganao, kadre de la Tria Afrika Kongreseto. Informoj: de UEA pri partopreno, aŭ de Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpe, Lomé, Togolando.

Povos okazi ankaŭ en Brazilo sesio, preskaŭ certe okazos almenaŭ unu en Ĉinio, povos aldoniĝi sesioj laŭ la deziro, ekzemple en Budapeŝto aŭ en la IJK aŭ en la ILEI konferenco.

- Ni kore dankas al Kastelo Grésillon pro reago al nia lastmomente aldonita alvoko sur p. 34 de la antaŭa numero, pro la alsendo de PV kaj aliaj utilaj libroj. Ni pardonpetas pro la akuzativa spageto komence de tiu alvoko, kies kulpo ne povas esti la tiama neposedo de la vortaro! Tamen ni konstatas, ke nia mesaĝo estis komprenebla kaj komprenita! Al ili, kaj al alia privata donacinto de plia vortaro, ni kore dankas!
- *La Skolta Mondo*, organo de SEL akiris novan redaktoron kaj grafikan veston. Ĝia numero 93/3 estis jubilea pro la 75-jara ekzisto de SEL. Pli proksima kunlaboro inter ILEI kaj SEL estus certe fruktodona. Kiu deziras ricevi specimenan ekzempleron de la bulteno kun listo de naciaj perantoj, bv. skribi al la redakcio: Anna Ritamäki, Peltolvägen 6 B 36, FI-20720 Abo/Turku, Finnlando.
- Aktivas esperanta grupo ankaŭ en la transnacia infana organizo *La Communaute des Loupiots d'Europe*. Informoj: Groupe d'action pour l'Esperanto, 123 rue de Royan, FR-16710 Saint-Yrieix, Francio
- Atingis la redakcio ankoraŭ unu propono pri ortografia reformo de Esperanto, de J.W. Yung kaj disvastigata el Tuluzo, Francio. Proponita estas lanĉo de bulteno kaj alpreno de deklaracio suplemente al tiu de Bulonjo en 1905. ILEI povas nur reemfazi sian taskon disvastigi kaj instruigi la laŭfundamentan Esperanton, kiel iniciatitan de d-ro Zamenhof, kaj tial povas nur malabrobe rilati al tiu kaj tiaj reform-projektoj.

Pesi du jarojn — de Voss ĝis Valencio

Stefan MacGill, Hungario

La celoj de ĉi tiu artikolo estas unue pesi la atingojn kaj mankojn de la mandat-periodo de aŭgusto 1991 (Voss) ĝis aŭgusto 1993 (Valencio) kaj due skizi la perspektivojn por la tuja kaj pli fora estonteco, ĉefe el la vidpunkto de financaj kaj homfortaj eblecoj.

Atingoj de la mandato

Sekcioj: Novaj sekcioj akceptitaj en Albanio, Rumanio, Kroatio kaj Kubo. Reprezentantoj akceptitaj en Armenio, Aŭstralio, Islando, Jugoslavio, Kostariko, Litovio, Nov-Zelando, Togolando kaj Ukrainio. Ĉiujara kompilado de sekciaj raportoj. Regula atento al sekciaj bultenoj en IPR. Modesta altigado de la membro-nombro.

Financo: Ioma fortigo de la liga kapitalo kaj Fondaĵo Ŝzerdahelyi – kvankam ĝis la fino de 1993 tiuj ambaŭ reŝrumpis, ĉefe pro iniciatoj de la mandata periodo. Ofertado de servoj (kursoj, konferenco) en hungaraj forintoj por loĝantoj de Centra kaj Orienta Eŭropo. Subteno al la internacia fako de ELTE. Akiro de lasera printilo.

Ekzamenoj: Vidu la apartan protokolon. Intensa tutmonda ofertado kaj trovo de nova sekretario por daŭrigi la elementan kaj mezan ekzamenadon. Kontinentaj reprezentantoj. Akceptigo de la regularo por la supera nivelo.

Servoj al instruistoj: Katalogado de E-klasoj, trovo de nova komisiito por starigi datum-bazan trakton de tio. Okazigo de IMS en Litovio. Kunlaboro kun projektoj kiaj 'Infanoj ĉirkaŭ la Mondo'.

Instruista trejnado: Ampleksa kurso en KCE en 1993 kun stipendiataj partoprenantoj el help-bezonaj landoj. Pli modestaj kursoj en aliaj centroj.

Konferencoj: Bratislavo 1992 altiris nekutime multajn konferencanojn, kun signife malpli alta kotizo ol kutime, kun zorga preparado de la faka programo, kaj de *Tago de la Lernejo* en Vieno. Sukcesaj lanĉo kaj ripeto de la Gimnazio de ILEI.

Eksteraj rilatoj: Bona laboro en Usono, kun prelegoj en konferencoj (MLA k.a.) kaj aperigo de trafaj artikoloj en la faka gazetaro.

Eldonado: Transpreno, ampleksigo kaj fortigo de *Juna amiko*. Regula kaj plejparte akurata aperigado de IPR kun kvalitaj fakaj artikoloj kaj organizaj informoj. Aperigo de du kajeroj de la lernolibra serio *Tendaraj tagoj*, de la metodika libro *Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado* de Magistro Irena Szanser, pretigo de lernolibro *Kunvojaĝu!* de s-ro Paŭlo Gubbins. Unuafoja atingo de nete enspeziga eldona agado.

Movadaj rilatoj: Atingo en Valencio de rubriko *Evoluigo* en la spezokonto de UEA, entenanta rubrikon *Instruado*. Kreskanta ligiĝo de ILEI al la vidbenda projekto de IEI. Refortigo de rilatoj kun KCE.

Ĝenerale: La starigo de modesta oficejo, akiro de aŭ aliro al maŝinoj necesaj por administrado kaj eldonado, kaj modesta honorariado.

Mankoj de la mandato

Sekcioj: Tro malforta kunlaboro inter la plimulto de la sekcioj kaj la internacia ligo. Ne-sufiĉo da pedagogoj oficiale instruantaj Esperanton inter la membraro. Nesufiĉa renovigo en la membraro.

Komisiitoj: Retiriĝo de tro da komisiitoj. Kelk-kaze ne-trovo de novaj.

Financo: La komenco de kreskante deficitaj jaraj spezokontoj. Foruzo de fondaĵaj kaj kapitalaj rimedoj por novaj agadoj (videbla post la mandato!)

Ekzamenoj: Pli da rimedoj bezonataj por fortigi la administradon kaj precipe por verki pli da testoj. Ne-trovo de du prezidantoj kaj sekretario kaj neplenumo de multa prepar-laboro por lanĉi la superan nivelon.

Servoj por instruistoj: Paŭzo en la kompilado de kontaktoj dum nova komisiito estis serĉata. Sistemigo de vizitantaj instruistoj, ĝemelado, oficialigo de instruistaj kursoj ktp. nesufiĉe progresis.

Instruista trejnado: Stipendiado kaj varbado por kursoj kun amplekso de tiu en 1993 ne estas nun entrepreneblaj pro financaj kaj homfortaj kialoj.

Konferencoj: 1993 kaj 1994 elstarigas la malfacilaĵojn organizi konferencojn en 'foraj' landoj kaj devigas la Ligon funde repripensi sian politikon.

Eksteraj rilatoj: La manko de kohera agado en Eŭropo. Ĉi tiu estas kampo kie kunlaboro inter la sekcioj kaj ILEI centre plej fruktodonus.

Eldonado: La longa prepar-tempo de eldonaĵoj, falanta labor-kapacito.

Movadaj rilatoj: Manko de fortoj por rilati intense kun centroj, asocioj, kiuj devus esti niaj aliancanoj.

Ĝenerale: La honorariado kaj 'oficeja' koncepto ne sufiĉe realiĝis kaj devis grandparte ĉesi fine de la mandata periodo. En ĝia lasta jaro, kaj eĉ pli severe tra la ok monatoj post ĝi, la manko de laborfortoj, kunordigitaj en iuspeca 'oficejo', suplemente al la streboj de unuopaj estraranoj kaj komisiitoj, pruviĝis ĉiam pli limiga kaj grave bremsis la agadon de la Ligo sur preskaŭ ĉiu kampo. Labor(mal)fortoj do ĉefrolos en la sekva analizo kaj vizio por diversaj estontecoj.

Tiu pritakso, kaj ĝia resumo en la apuda tabelo, restas tre subjektiva, kaj eble preterlasas agadojn en aliaj mondpartoj nesufiĉe konataj al mi. Ĝi ne provas inkluzivi enlandan laboron de niaj sekcioj.

Revoj kaj imagoj por iuj estontecoj

La apuda tabelo provas priskribi kaj kvantigi tri statojn. Unue, la nunan staton de la Ligo, due la staton, kiun ni celis kaj parte atingis tra 1992-93, kaj laste, tian staton, kiun ILEI devus atingi, por adekvate roli kiel la ĉefa aganto por la movado sur la eduka kampo. Tian staton ĝi neniel atingus propraprimede, ĝia atingo dependus je kreskanta konsciado en la tuta movado pri la ŝlosila rolo de instruado de Esperanto, kreado de modernaj lerniloj, kohera instruista trejnado, kaj preteco je signifa skalo investi en tio.

Supre en la tabelo la monaj ciferoj estas en svedaj kronoj, sube la homfortaj mezuroj estas *hom-horoj/jare*. La maldekstra cifero prezentas honorariatajn horojn, la dekstra volontulajn.

RUBRIKO	NUNA SITUACIO (1994)	CELITA (92-93) CELINDA ('95)	PERSPEKTIVA (1998?)
Jaraj enspezoj	78.000 SEK	100.000 SEK	160.000 SEK
Jaraj elspezoj	90.000	120.000	180.000
Negativa saldo	- 12.000	- 20.000	- 20.000
Investo movada	16.000	20.000	50.000
Membro-kotizo	80	120	150
Kapitalo +Fond.	145.000	200.000	400.000
Honorarioj ĝen.	1.000	5.000	20.000
Honorarioj *JA*	2.500	8.000	10.000
Honorarioj sume	3.500	13.000	30.000
% de enspezoj	4 %	13 %	17 %
% de kapitalo	3%	6 %	7 %
Plentempe pagataj homoj	0,2	0,8	2,0
Pagataj horoj/jare	400	1600	4000
Ne-pagitaj-estraro	600	800	800
–komisiitoj, LKK	250	500	800
–sekcioj por ILEI	50	200	500
Ekzamenoj	50 + 100	150 + 100	500 + 200
JA, administre	90 + 60	150 + 100	200 + 100
JA, redaktado	70 + 40	150 + 100	300 + 100
IPR	100 + 100	150 + 100	500 + 100
Instruistaj kursoj	20 + 150	150 + 100	500 + 200
Aranĝoj	20 + 150	150 + 300	500 + 400
Libroservo	10 + 50	50 + 50	200 + 200
Libro-eldonado	10 + 100	150 + 400	300 + 400
Subteno kom +est	10 + 50	100 + 50	100 + 100
Ĝenerala admin.	10 + 50	250 + 100	500 + 100
Eksteraj rilatoj	10 + 50	150 + 100	400 + 200
LABORHOROJ JARE SUME	**400 + 900**	**1600 + 1500**	**4000 +2100**

Kiun nivelon da agado oni rajtus atendi el la tri hipotezaj kazoj de nia tabelo? Sube mi provos skizi tion.

Trajtoj de la nuna situacio:

Ni havas denove modestan spezokontan deficiton kun preskaŭa malpleniĝo de la Fondaĵo Szerdahelyi, kiu negative influas la kapitalon. Ni havas egan laborfortan deficiton, kiu bremsas sur plej diversaj kampoj. Honorariado estas nun kvaronigita (restas nur por la redaktado kaj administrado de *Juna amiko*, iomete por IPR kaj gutetoj por aliaj laboroj). Tio devos resanigi la financan staton por 1994. Feliĉe, instruista kurso de ILEI okazos denove ĉe KCE, sed sen la stipendia parto. Pliaj aktivuloj de ILEI kiel unuopuloj kontaktis E-centrojn kaj gvidos kursojn. Vi klare sentas la laborfortan problemon ĉe IPR, kiu ne havas alian eblecon ol malfrui. La estraro devos fronti la eblecon en 1994 aperigi nur tri numerojn por rekapti la ritmon. La nuna verkanto, vic-redaktoro, povas dediĉi apenaŭ la trionon de la antaŭa tempo, kaj sentus la neceson demisii el tiu posteno. Tio tamen ne havas sencon, ĝis alia kunlaboranto aŭ solvo troveblos. *Juna amiko* aperadas regule, nur pro grandaj fortostreĉoj; nuntempe okazas temporabaj investoj en varb-kampanjo kaj komputiligo de la administrado. La eldona fako havas multajn projektojn, sed eblas atendi ne pli ol aperigo de unu cent-paĝa libro jare. Eksteraj rilatoj en Eŭropo ne estas trakteblaj sisteme.

Faka preparado de aranĝoj kiel IMS kaj la Gimnazio estas farata centre, sed la realigo ofte dependas kritike je surlokaj volontulaj fortoj. Valencio kaj Seŭlo montras la neceson por pli firma centra konferenca administrado. ILEI staras antaŭ dilemo: ĉu atendi kompletajn informojn kaj aperigi la informilon tro malfrue, ĉu aperigi ĝin ĝustatempe, sed kun informoj, kiuj poste pruviĝas neĝustaj? Ĉiam restos la neceso dependi je la bonvolo kaj laboremo de la surloka teamo, sed necesas en ILEI homo preta investi multan tempon (estraranoaŭ honorariito) en atentigo pri la konstantaj bezonoj kaj limdatoj, pritasko de la lokaj eblecoj, elekto de taŭga ejo, fikso de buĝeto ktp. ktp. Manke de tiu homo, ILEI devos rezigni pri la politiko sekvi la UK ĉien en la mondo, kaj limigi siajn konferencojn al tiuj kelkaj mondpartoj, kie loĝas estraranoj aŭ funkciuloj aŭ kie la organizado facilus (praktike nord-okcidenta aŭ centra Eŭropo aŭ Usono). Tio estus klare malpozitiva paŝo. Mezaj kaj elementaj ekzamenoj statas bone, sed mankas fortoj por la supera nivelo.

Celita kaj dezirinda stato

Ni provis en 1992 kaj 1993 enkonduki honorariadon, ni ekpagas modestan luon, aĉetis laseran printilon kaj havas aliron al komputilo. Konsilindas plupagi tiun luon kaj funkciigi la eldon-agadon kaj libroservon el Budapeŝto, kvankam IPR bezonas homfortan solvon tie. La faka preparado de aranĝoj plue okazas en Budapeŝto, sed kiel 'oficejo' por la ĉiukampa funkciigo de ILEI ĝi almenaŭ nun ne povas funkcii. La honorariado preskaŭ ĉesis, kaj ni ne vidas taŭgajn kondiĉojn por restarigi tion. Manke de tio, ni prefere konservu la monon por refortigi nian kapitalon.

Mi opinias neevitebla kaj necesa havi gradon de honorariado en ILEI. Volonte mi konstatus ŝprucadon de aktivado kaj kontribuemo el volontulaj fontoj – estraranoj kun senlime oferebla tempo, novaj komisiitoj, internacie aktivaj sekcioj – sed manke de tio, ni devas transigi nian financan bazon al alia nivelo kaj pliigi la honorariadon, eble kun 'oficejo' en alia mondparto. La dua kolumno en la tabelo montras la konturojn de miaopinie dezirinda stato por kiel eble plej baldaŭa atingo: 0,8 plentempuloj, reale eble unu duontempulo plus diversaj honorari-et-atoj. Laŭ tiu skemo, ni honorarius pli ol nun la prizorgantojn de IPR kaj *Juna amiko*, la ekzamena(j)n sekretario(j)n, dum la duontempulo plenumus la grandan administran laboron pretigi ĉiujare unu ampleksan instruistan kurson, aranĝi ĝiajn stipendiojn, rilatus instensive kun LKK de la Konferenco, Gimnazio kaj IMS kaj regule kontaktus sekciojn. Tiel IPR povus aperi 4-foje kaj regule, de la eldona fako ni rajtus atendi pretigon de du 100-paĝaj libroj jare.

Perspektiva ILEI

La tria kolumno prezentas tion, kaj mi pretas enkasigi riproĉojn kaj mokojn pri kap-en-nuba revado. Ĝi supozigas ioman ampleksigon de la jaraj spezoj, sed pli esence pluroblan kreskon de nia kapitalo por permesi al la Ligo akcepti la pli grandajn riskojn de enkondukata profesiigo. ILEI havus la ekvivalenton de du plentempaj oficistoj, kiuj per sia agado, tre baldaŭ devus ekkovri la kostojn de honorariado. IPR aperus ne nur regule, sed kun fakaj artikoloj aktive varbataj. *Juna amiko* estus sisteme varbata, kaj multe pli alta proporcio de ĝia labor-postulo dediĉiĝus al la redaktado kaj verkado de la enhavo (nuntempe la administrado postulas 70% de nia tempo, redaktado 30% – devus esti inverse!). La eldona fako, aldone al du libroj jare, povus krei unu aŭ du ne-librajn lernilojn – son- aŭ vid-bendojn ekzemple.

La ĉefa instruista kurso povus okazi en novaj mondpartoj, la stipendiado kreski, kaj ILEI povus okazigi serion da pli modestaj kursoj diversloke (kiel okazis en Budapeŝto kaj Poprad en 1993). Ĝi povus kadre de la programo de eksteraj rilatoj strebi al oficialigo de tiuj aŭ tiaj kursoj en landoj, kie favoras la cirkonstancoj. La supera ekzameno estus lanĉebla per honorariata sekretario. Pagato(j) kunlaborus kun pli aktivaj sekcioj por starigi eksterajn rilatojn, plenumus pli akurate ĝeneralan administradon kaj subtenus la estraranojn kaj komisiitojn per konkreta plenumo de taskoj kaj projektoj por ili.

Kelkaj atentigoj

Ne ĉiu en ILEI konsentos pri la kreskanta honorariado en la Ligo – ĝi ja transformos ĝian etoson kaj funkciadon. Mi mem ne estas senkondiĉa apostolo de tiu evoluo, nia sperto en la lastaj jaroj portas por ni klarajn lecionojn.

Unue, ni devas senĉese provi aktivigi volontulan laboron, tio ĉiam restos la kerno de niaj fortoj. Honorariatoj kaj volontuloj devas trovi manierojn harmonie kunigi siajn fortojn.

Due, ni devas ĉiam protekti nian financan bazon; honorariado bezonas komencan investon, por ILEI granda, antaŭ ol la fruktoj de tiu laboro post ses,

naŭ, dek du monatoj ekmaturas. Pro plej diversaj kialoj (ĝis inkluzive la staton de la monda ekonomio), tiu reveno de la investo neniam estas certa. Sekve la honorariado devas esti zorge kontrolata. Baza mezurilo estas la procentaĵo de la jaraj spezoj kaj kapitalo, kiun oni dediĉas al honorarioj – eĉ en la plej reva kazo, tiu devus ne superi respektive 20% kaj 10%.

Trie, oni honorariu nur kaze de taŭgaj kondiĉoj kaj kandidatoj. Se tiuj mankas aŭ malfortas, prefere modestigi la agadon, eluzu volontulajn fortojn kaj atendi pli taŭgajn cirkonstancojn. Rutina kaj mekanika laboro kiel ekspedado de cirkuleroj kaj gazetoj ĉiam apartenu al volontuloj. La Ligo povas honorarii tiom malmulte da homoj, ili estu tiuj, kiuj povas altnivele administri, koncepti, detaligi kaj realigi tutajn projektojn, mobilizi helpantojn kaj funkcii flekseble kaj memstare sur plej diversaj terenoj.

Dedukteblas el tio, ke niaj honorarioj ne povos speguli la komercan valoron de la atendata laboro – nek hore, nek kvalite. Tiel ĉiam estis, kaj la Ligo ne pretendu alie. Eĉ en plej bona kazo, nia honorario al plentempulo ne povus superi oficialan minimuman salajron – en pluraj mondpartoj kun altaj viv-kostoj, ILEI eĉ ne tion povus atingi. Grava kaj centra motivigo de honorariatoj devas resti tiu, kiu ĉiam movis niajn agantojn: kredo je la tasko, sindediĉo kaj preteco oferi. La honorariado estus nur iom pli ol simbola rekono de la kontribuo, permesanta al la koncernato dediĉi pli da horoj ol sen rekompense.

La Ligo aŭskultas la kasiston, kiu defendas buĝeton. Necesas en la estraro ankaŭ pretigi homfortan buĝeton, kaj krei aŭ limigi la planojn laŭ tio. Nuntempe, la homforta buĝeto limigas pli strikte kaj akute, ol la financa. Serĉado de nova talento kaj trejnado de aktivuloj devas preni unuarangan lokon!

Konkludo

Prave vi povus imagi, ke fronte de tiu monto de kondiĉoj kaj avertoj, neniam ni sukcesos profesiigi la laboron. Multaj nostalgias al antaŭa epoko kaj hezitas iri tiun vojon. Tamen, tiaj tempoj neniam revenos, dume ILEI havas la mision modernigi kaj vastigi la instruadon de Esperanto en la nuna ŝanĝita mondo ĝi devas preti alpreni pli aktualajn metodojn en tio.

Ŝlosila objeto al mia utopia tabelo estas: kia magia sorĉaĵo duobligos nian kapitalon el la dua ĝis la tria kolumno? Certan respondon mi ne havas – du vojoj videblas. Unue, multego pezas sur la ŝultroj de la trovendaj hororariatoj kaj la gvidantoj, efika laboranto kreus enspezojn, kiuj ne nur kovrus la honorarion, sed kreus programojn, kiuj certigus regulan enfluon de pagoj – finfine en la cetera mondo edukado estas ege enspeziga kampo – kial ne ĉe ni? Due, la tuta esperanta movado devas pli klare senti la gravecon de efika instruado kaj esti preta investi en tio. La nova buĝetero ĉe UEA estas kuraĝiga sed nur komenca paŝo. Oni ne rajtas atendi, ke solaj la instruistoj mem, kiuj jam ofertas siajn tempon kaj energion, financu la tutan edukan laboron.

Estas konsterne kaj al eksterulo apenaŭ kredebla, ke nia movado entute (laŭ mia scio) ne dungas eĉ unu homon, por ekskluzive okupiĝi pri la eduka kampo. Estas jam nun tempo, kiel eble plej baldaŭ ripari tiun mankon!

TRA LA SEKCIOJ

Ĉinio: Eldono de speciala numero de Linhai-a Infana Esperanto-Lernejo

Linhai-a Infana Esperanto Lernejo, fondita la 1-an de junio 1989, estas la unua E-lernejo por infanoj en Ĉinio. Memore pri la fondiĝo aperis speciala eldonaĵo kun salutvortoj de esperantistaj kaj ne-esperantistaj eminentuloj; konciza prezento pri la evoluo de la lernejo kaj pri pliaj planoj; tri poem-tradukoj.

La gelernantoj deziras korespondi kun samaĝuloj tutmonde, la lernejo volas havi kontaktojn kun E-organizoj por infanoj kaj elementaj lernejoj.

Zhu En, Xichengxia 10-hao, CN-317000 Linhai, Zhejiang, Ĉinio



Nova sekcio: Albanio

La foto ricevita el Albanio prezentas kursanojn de sinjoro Bardhyl Mezini – ĉiuj engaĝitaj en instruado en okjaraj kaj mezaj lernejoj de la ĉefurbo. La albanaj gekolegoj delonge klopodas atentigi funkciulojn de Ministrejo por Edukado pri propedeŭtika valoro de Esperanto. Tiucele ili planas akiri permeson ekstarigi eksperimenton en pluraj urboj de la lando.

Latin-Ameriko: Lernejoj por la nova kulturo

Tiuj lernejoj estas loko por mallaciĝo, por lerni la arton vivi kaj ne nur akumuli konon. Kompleta atento, unueca perceptado faciligas novan konscion. Infanoj lernas tie vivi sen la ŝarĝo de la pasinteco, sen la dividigo de ideoj, nacioj, kredoj kaj antaŭjuĝoj, sen la arda timo je la estonteco. Sen profit-deziro.

La unua lernejo fondiĝis en 1991, 8 km-ojn de Santa Fe, en Argentino. Maksimuma nombro da gelernantoj po lernoĉambro estas dek. Kvin intruistinoj atentas pri 40 infanoj en oktobro 1993. Kursoj estas de la 10-a ĝis la 17-a horo, de lundo ĝis vendredo. La gepatroj kunsidas kun instruistinoj ĉiusabate en kultura pikniko kie diversaj temoj estas pritraktataj.

En 1992 estis fondita lernejo „Verde y Vida" (Verdo kaj Vivo) en Chaco, kaj ankaŭ „El Paraiso" en Esperanza (ambaŭ en Argentino). Baldaŭ ekfunkcios lernejoj en Mexicali kaj Monterrez, en Meksikio. En 1994 doktoro Rubén Feldman González vizitos Peruon kun la intenco fondi novan lernejon tie.

Por la instruado en Argentino kaj Meksikio estas bezonataj 5 geinstruistoj. Sendu viv-resumon al:

Rubén Feldman González, P.O. Box 230662 Anchorage, Alaska-99523 USA Fax: (907)338-0776 Ricevos prioritaton esperantistoj de la menciitaj du landoj.

Ĉiuj personoj, kiuj akceptus viziton hejme de la gelernantoj de la lernejoj por nova kulturo, skribu al la sama adreso supre. Bonvolu mencii daŭron de la gastigado.

Mi havas tradukojn de la esperanta himno 'La espero' angle, bulgare, ĉehe, dane, estone, finne, france, germane, hebree, hispane, hungare, ide, irlande, itale, jide, kaltaĝire, katalune, koree, makedone, nederlande, norvege, pole, portugale, rumane kaj ruse. Kompletigojn kaj proponojn bonvenigas Georgo Csullög, Mikszáth K. u. 34, HU-5530 Vésztö, Hungario.

Talento-Lernejo

en Budaörs (Hungario) serĉas esperantistajn instruistojn pri diversaj fakoj (matematiko, literaturo, natursciencoj ktp.).

Pri la unua jaro de tiu lernejo v. IPR 90/2 artikolon de Ertl István: Sorobano kaj koro-bano. La lernantoj de la unua klaso post dujara intensa lernado de Esperanto eklernis la francan lingvon kaj sukcese prezentas franclingvajn kulturajn programojn en la ĉefurbo. La dua klaso nun faras la bazojn per Esperanto. Instruas ĉiujare bunta internacia kolekto de geintruistoj.

Ĉe la elekto de estontaj instruistoj avantaĝoj estas: kreativeco, diplomo pri Esperanto kaj pri menso-kontrolo, intereso pri medio-protektado. Kontaktu: LUKÁCS András, H-2041 Budaörs, Pf. 102. Tel: (33-1) 1669-866 1868-854 1857-183

Ekzamenoj UEA/ILEI

Kvin jaroj da intensa laboro

Antaŭ kvin jaroj UEA kaj ILEI kunfandis siajn ekzamenajn programojn en unu, lasanta la respondecon por verkado kaj administrado en la manoj de la instruista ligo. Sekve, aldone al la raporto por 1993, kompletigo por 1992 kaj antaŭrigardo al la nova jaro, ni pretigis kvin-jaran resumon.

Ekzamenoj 1993

Ok sesioj en ok landoj en tri kontinentoj altiris 80 kandidatojn el 15 landoj 4 kontinentoj, el kiuj 77 sukcesis – 57 elemente kaj 20 meze. Temas pri nur 76 fizikaj personoj, ĉar unu trapasis ene de la jaro (eĉ ene de unu sesio) kaj la elementan kaj la mezan ekzamenon, kvankam la regularo ne starigas tiun devon.

Apartan gratulon meritas la sesio en Ĉengde, kun 40 sukcesintoj. Ĉinio per tio forprenas de si mem la rekordon por la plej granda sesio (36 en 1992). Jen pruvo de kaj modelo por la malcentrigo de la ekzamenoj laŭ kontinentaj prizorgantoj.

Ni ĝojas aldoni novajn ekzamenajn centrojn, Barlastonon en Britio kaj Sète en Francio, kie okazas regulaj ĉiujaraj kursoj – bonas ankaŭ vidi signifan sesion denove en KCE – kie efektive naskiĝis la nunaj ekzamenoj en 1989.

Ekzamenoj 1992

Okaze de la nunjara sesio en KCE, eblis kompletigi la protokolon por 1992, per tri elementaj kaj unu meza sukcesinto: Bianchini, Daniela, Italio; Rooke, Dieter, Svisl.; Bélisle, Mario, Svisl. (elemente) kaj Grosjean, Marion (meze). Tiel la nombro de sukcesintoj altiĝas de 68 ĝis 72.

Resumo de la sesioj en 1993

Sesio, lando	Kandidatoj	Elemente	(Kontentige	Bone	Tre) bone	Meze	SUME
La Chaux-de-Fonds, Svis. jul.io (CF)	13	6	0	4	3	7	13
Sanfrancisko, Usono, julio (SF)	3	2	0	0	1	1	3
Valencio, Hispanio, julio (UK)	8	2	1	4	1	6	8
Vraca, Bulgario, aŭg., (VR)	2	1	0	0	0	1	12
Barlaston, Britio, aŭg., (BL)	5	5	0	0	0	0	5
Ĉengde, Ĉinio, aŭg., (ĈN)	42	40	0	0	0	0	40
Sète, Francio, sept., (ST)	6	1	1	2	2	5	6
Zagrebo, Kroatio, dec.	1	0	0	0	0	0	0
SUME	80	57	2	10	8	20	77



Protokolo de sukcesintoj en la elementa ekzameno 1993

(57 sukcesintoj el 11 landoj)

Lando, urbo, NOMO, sesio

Albanio, Durres, **Grashi**, Majlinda (CF)
Albanio, Tirana, **Gjurgji**, Zamir (CF)
Angolo, Luanda, **Luenda**, Leonardo (UK)
Britio, Beverley, **Flint**, Marjorie (BL)
Britio, Birmingham, **Tustin**, Catherine (BL)
Britio, Butterton, **Simcock**, William (BL)
Britio, Letchworth, **Farrier**, Will (BL)
Britio, Manĉestro, **Edwards**, Roselyne (BL)
Ĉinio, Ĉengde, **Zheng**, Shuhui (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Liu**, Fengwei (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Zhao**, Shili (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Wang**, Liqing (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Zhao**, Fujiu (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Gao**, Zhenhong (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Liu**, Shufang (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Zhao**, Suxiang (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Gao**, Shuang (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Zhang**, Hongshuang (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Ren**, Zhihua (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Li**, Yunchao (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Naren**, Gaowa (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Sun**, Yuguo (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Zhang**, Yong (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Dong**, Chengbin (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Zhou**, Zhimin (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Zhang**, Lihua (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Yang**, Yu (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Shi**, Wen (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Guo**, Hongmei (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Duan**, Haiyan (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Wan**, Shuyuan (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Qi**, Shuping (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Cheng**, Yunhui (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Ma**, Tianshu (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Zhi**, Shaohong (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Liu**, Jie (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Wang**, Fei (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Chen**, Hongwei (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Hu**, Xiting (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Feng**, Wanguo (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Wang**, Lei (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Jiao**, Jiucun (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Zhu**, Haibin (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Yue**, Liying (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Liu**, Jianwei (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Wang**, Zhe (ĈN)
Ĉinio, Ĉengde, **Liu**, Yan (ĈN)
Ĉinio, Panjin, **Li**, Maoyong (ĈN)
Francio, Avignon, **Humm**, Simone (CF)
Francio, St.-Pierre-la-Mer, **Roques**, Andrée (ST)
Germanio, Neumünster, **Bielenberg**, Karl-Albert. (CF)
Kanado, Victoria, **Peterson**, Marjorie (SF)
Kroatio, Rijeka, **Katunar**, Josipa (UK)
Nederlando, Deurne, **Wiertz**, Wilhelmus (CF)
Rumanio, Brasov, **Gordea**, Ovidiu (VR)
Rumanio, Timisoara, **Secula**, Maria (CF)
Usono, Freeville, **Oltz**, Michael (SF)

Protokolo de la meza ekzameno por 1993

(20 sukcesintoj el 8 landoj)

Lando, urbo, nomo, sesio

Belgio, Kalmthout, **De Mulder**, Jorg (VR)
Britio, York, **Ibbotson**, John (CF)
Francio, Angoulème, **Conde-Rey**, Marie-F. (UK)
Francio, Angoulème, **Martinez**, Isabela (UK)
Francio, Avignon, **Humm**, Simone (CF)
Francio, Besançon, **Giovendo**, Jérôme (UK)
Francio, Bourges, **Lavarenne**, Christian (UK)
Francio, Briançon, **Noireau**, Françoise (CF)
Francio, Montpellier, **Vierne**, Yvette (ST)
Francio, Perigueux, **Gregoire**, Jacques (ST)
Francio, St. Mamert, **Gaussen**, Andrée (ST)
Francio, St. Rieutort, **Comte**, Jorgos (ST)
Germanio, Hamburg, **Karst**, Imgard (CF)
Germanio, Hamburg, **Schneider**, Bodo (CF)
Germanio, Heidelburg, **Hopper**, David (ST)
Germanio, Memmingen, **Salzmann**, Karl-E. (CF)
Hispanio, Valencio, **Mendoza Casp** Pablo (UK)
Israelo, Haifa, **Gregory**, Michele (CF)
Kanado, Calgary, **Simon**, Alan (SF)
Svislando, Oensingen, **Rooke**, Dieter (CF)

Ekzamenoj 1994

La elementaj kaj mezaj ekzamenoj pluiros sub la prizorgo de novaj sekretario kaj kontinentaj respondeculoj, kiujn ni prezentos al vi apude. Sesioj estas petitaj en Finnlando kaj Brazilo kaj atendataj en Sanfrancisko, Barlastono, Zagrebo kaj en la Afrika Kongreseto. Sesioj en Sud-ameriko kaj Afriko konformas kun la celo porti la ekzamenojn al tiuj, kiuj ne povas porti sin al UK aŭ trans kontinentaj limoj, kaj paralelas la ekfunciadon de kontinentaj prizorgantoj en tiuj lokoj.

Bilanco de la kvin jaroj 1989-93

En tiu kvinjara periodo 335 sukcesintoj estis registritaj, loĝantaj en 38 landoj en ĉiuj kontinentoj (120 en Azio, 28 el Ameriko, 6 el Afriko, 1 el Aŭstralazio kaj 180 el Eŭropo.) Okazis 41 sesioj (ekvivalenta al unu ĉiun sesan semajnon!) en 20 landoj en 4 kontinentoj. En Eŭropo okazis 28 sesioj kun 186 sukcesintoj, en Azio ses kun 118, en Ameriko 6 kun 30 kaj en Afriko unu kun unu.

Ĉinio havas klare la plej grandan nombron da sukcesintoj: 116, kaj organizis ĉiujn el la ses aziaj sesioj kun sume 118 sukcesintoj.

La ekzamenoj okazis ĉiujare en la UK, kie sukcesis 61 el la kandidatoj: sep sukcesis en 2 IJK-oj kaj tri en 2 ILEI-konferencoj. Kultura Centro Esperantista en Svislando gastigis ses sesiojn kun 34 sukcesintoj, SFSU en Sanfrancisko, kvar sesiojn kun 22 sukcesintoj. Tri kandidatoj en la periodo estis parte aŭ tute blindaj.

Por la cetero, ni lasos al du tabeloj paroli; ili estis kompilitaj surbaze de la landlimoj kaj landnomoj en la momento de la okazintaj sesioj.

Sukcesintoj en la ekzamenoj UEA/ILEI laŭ loĝlandoj

Dekstre aperas la nombro de sesioj kaj sukcesintoj en la koncerna lando.

Lando	1989	1990	1991	1992	1993	SUMO	Sesioj	Sukcesintoj
Ĉinio	14	0	27	35	40	116	6	118
Rumanio	0	0	22	0	2	24	1	21
Francio	5	3	1	0	12	21	1	6
Belgio	2	0	13	0	1	16	1	13
Usono	8	4	0	2	1	15	4	22
Germanio	2	1	2	3	5	13	1	1
Bulgario	0	0	10	2	0	12	3	17
Nederlando	3	3	2	3	1	12	3	8
Hungario	0	0	10	0	0	10	1	10
Svedio	3	5	1	0	0	10	1	4
Svislando	3	2	0	4	1	10	6	34
Jugoslavio	2	4	3	0	0	9	2	10
Kanado	2	3	0	0	2	7		
Britio	0	0	1	0	6	7	2	14
Finnlando	0	0	3	4	0	7		
Italio	1	3	0	2	0	6		
Hispanio	0	2	0	1	1	4	1	8
Brazilo	1	0	2	0	0	3		
Meksikio	0	2	0	1	0	3		
Norvegio	1	0	0	2	0	3	1	15
Albanio	0	0	0	0	2	2		
Ĉeĥoslovakio	0	0	0	2	0	2	1	1
Irlando	1	0	0	1	0	2		
Islando	0	0	1	1	0	2		
Israelo	0	0	1	0	1	2		
Kostariko	0	0	0	2	0	2		
Kroatio	0	0	0	1	1	2	2	1
Angolo	0	0	0	0	1	1		
Ĉilio	0	1	0	0	0	1		
Danlando	0	0	0	1	0	1		
Irano	0	0	1	0	0	1		
Kubo	0	0	0	1	0	1	2	8
Malagasa DR	0	1	0	0	0	1		
Nov-Zelando	0	1	0	0	0	1		
Ruando	1	0	0	0	0	1	1	1
Singapuro	0	0	0	1	0	1		
Sovetunio	0	0	1	0	0	1		
Tanzanio	0	0	1	0	0	1		
Togolando	0	0	0	1	0	1		
Zairio	0	0	0	1	0	1		
Aŭstrio	0	0	0	0	0	0	1	23
SUMOJ	49	35	102	72	77	335	41	335

Sukcesintoj laŭ gradoj 1989-1993

	1989	1990	1991	1992	1993	SUME
SESIOJ						
Nombro da sesioj	7	9	10	7	8	41
Landoj de sesioj	6	6	8	7	8	20
Kontinentoj de sesioj	3	2	2	3	3	4
SUKCESINTOJ						
Elemente	14	17	35	39	57	162
Meze kontentige	9	3	14	8	2	36
Meze bone	15	7	33	14	10	79
Meze tre bone	1	8	20	11	8	58
Meze sume	35	18	67	33	20	173
SUME	49	35	102	72	77	335
Loĝlandoj	15	15	18	20	15	38
Loĝkontinentoj	4	4	4	4	4	5


Sufiĉas fermi ĉi tiun raporton per sincera danko al la centroj kiuj okazigis sesiojn, al la ekzamenintoj kiuj donis siajn tempon kaj energion, al la kandidatoj, kiuj pene preparis sin, kaj ĉiuj, kiuj helpis al ni atingi ĉi tiun rezulton tra la lastaj kvin jaroj. Vokindas por simila kaj pli intensa subteno (nelaste pri testo-verkado!) por la nova teamo, sub la gvido de ekzamena prezidanto d-ro Till Dahlenburg kaj sekretario prof. Bekavac-Basiĉ, kiuj pluportos la torĉon al pliaj atingoj.

Aginta sekretario de la ekzamenoj, Stefan MacGill.

Nova konsisto de IEK por 1994


Sekretario:

Prof. Ivan BEKAVAC-BASIĈ, Kroatio.



Naskiĝis 1950, finstudis en Zagrebo teologion en 1976, diplomiĝis post kvinjara studado en 1978 en la latina lingvo kaj filozofio sekvante post-diplomajn kursojn. Instruas la fakan latinan ekde 1980 en la Zagreba Medicina Mezlernejo. Li kunaŭtoris lernolibron *Elementa linguae Latinae medicae* jam en kvina eldono, kaj latin-kroatajn vortarojn kaj gramatikon. Li estas estrarano de la Kroata Societo de Klasikaj Filologoj kaj Sekretario de la Kroata Filozofia Societo, kies gazeton li redaktas. Esperantistiĝis en 1983, ekde 1984 gvidas regulajn kursojn, membro de ILEI, vicprezidanto de KEU kun respondeco pri edukado, helpis starigi la UEA/ILEI ekzamenojn enlande. Li havas familion kun tri infanoj.

Reprezentanto por Afriko:
S-ro GBEGLO Koffi, Togolando.



Naskiĝis en 1957 en vilaĝo Anjronkope sude de Togolando. Post triagrada edukado kun perkoresponda supera kurso en la ĉefurbo Lomé, nun estas tie instruisto pri matematiko en duagrada lernejo.

Eklernis Esperanton en 1984 laŭ kurso Ferez gvidata de s-ro Hans Bakker. En 1987, post restado en Hungario, sukcese trapasis la tiutempan mezan ekzamenon de UEA/ILEI en Varsovio dum la 72a UK.

Estas de post 1987 ĝenerala sekretario de la enlanda movado. Lia novfondito estas Tietti-Instituto de Esperanto en Togolando. Helpas afrikanojn trapasi ekzamenojn, ekz. de Zagreba metodo; la celo estas oferti la UEA/ILEI ekzamenojn en diversaj landoj de Afriko kun nomotaj propraj ekzamenotoj.

Havas edzinon kaj trijaran filon. Piedpilko kaj damludo estas ŝatokupoj, sed Esperanto prenas la ĉefan lokon. Elstara afrika esperantisto, aŭtoro de du libroj en Esperanto.



Reprezentanto de Latin-ameriko:
S-ro ORELLANO-ROJAS Atiljo, Argentino.

Tridekjara vojaĝanta instruisto de Ĉe-Metodo, regule gvidas seminariojn kaj kursojn tra Latin-Ameriko kaj aliloke. Vidu artikolojn en *Esperanto* kaj IPR (ekz. 92/4, p.39 kaj 93/3).

Reprezentanto de Azio: Prof. ZHANG Danchen, Ĉinio.



Funkcianta reprezentanto por Azio, jam membro de IEK kaj estrarano de ILEI. Asista profesoro en la Normala Universitato de Wuhan. Vidu la ILEI sinprezentan broŝuro por pli detala biografio.

Kontinentaj reprezentantoj rajtos teni ekzamentestojn, verki proprajn, teni atestilojn, nomi ekzamenantojn, starigi sesiojn kunvokante la surlokajn ekzamenojn kaj prizorgi la financadon el la kotizoj – ĉiam informante la Sekretarion pri ĉiu faraĵo.

Sekve la konsisto de IEK ekde nun estas: d-ro Till Dahlenburg (prez), Prof. Ivan Bekavac-Basiĉ (sekr), N. Bojaĝiev, F. Lo Jacomo, Zhang D. (Azio), Gbeglo K. (Afriko), Orellano-Rojas, A. (Latin-ameriko).

smg

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana
Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo SP
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca
Ĉehio: Miroslav Malovec, Charkovska 7/10, 625 00 Brno
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
Estonio: Eve Otsa, Juhkentali 30-12, EE-0001 Tallinn
Finnlando: Synnöve Mynttinen, Keskussairaalankatu 5 M 133, SF-15850 Lahti
Francio: S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin du Thural, F-74920 Combloux.
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weisshorn
Hispanio: Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, HU-1221 Budapest
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa
Japanio: *vakas kaj forstrekota.*
Korea Resp.: So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
Kroatio: Ivan Bekavac-Basiĉ, Kuŝlanova 59, HR-41000 Zagreb
Kubo: H. Jiménez, Vista Alegre 264 e/J.B. Zayas y Luz, Caballero, Vibroa, 11500 C.Habana.
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 387, 1704 BH Heerhugowaard
Nordameriko: Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio: Bjorn Thuv, Aroyveien 33, N-3135 Torod.
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw 17
Portugalio: D-ro Antonio M.C. Coimbra, Rua Colonel M. Leitao 20.1 Esq., P-1700 Lisbon
Rumanio: Angela Stoica, Platanilor 17 C ap. 4, RO-1900 Timisoara
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, 058 01 Poprad
Slovenio: Sonja Tavcar, Liminijanska 6, SLO-66320 Porotoroz
Sud-Afriko: *vakas*
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby
Svislando: IMireille Grosjean, Rue du Temple 20, CH-2416 Les Brenets
Venezuelo: Prof. Juan Eduardo Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaire)

REPREZENTANTOJ DE ILEI

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P. O. Bolpur 731204, W. Bengal.
Irano: Mohammad Karamudini, P. O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur.
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603-1000, San José.
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius.
Niĝerio Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
Nov-Zelando: 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
Togolando: Afantchao-Biakou Yao, B.P. 20225 Lome.
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UKR-253222 Kiev.
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, Taŝkent

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle.
Ekzamenoj: Elementa kaj meza niveloj : Sekretario : d-ro Ivan Bekavac-Basic.
Supera nivelo: Sekretario serĉata.
Prezidantaro: d-ro Till Dahlenburg plus du nomotoj de UEA.
Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Edward Symoens, Putsesteenweg 151, BE-2920 Kalmthout (Heide); tel. (+32 3) 666 62 66.
Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien; tel. (+43 222) 36 86 29.
Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyiri u. 11, HU-6000 Kécskemet.
Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore Budapeŝto plenumas. *Ni traktas kun nova plenumanto en Usono.*
Statuto: Rob Moerbeek kaj Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl; tel. (+31 2209) 15 65.
Terminologio: *vakas*
UN-Jaro de la Familio 94: prof. Glossop.

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, F-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris
UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.
KCE: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.
ECP: Esperanto-Centro Poprad, Sobotske nám. 6, 058 01 Poprad, Slovakio. Konto: 18431-563/0200 de Vŝeoecna ŭverova banka, Poprad.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por OKR-enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo. Bv. skribi vian nomon kaj adreson sur la manuskripto. Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitaj paĝoj. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGOJ POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksis kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:
Kasisto de ILEI: B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:
UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĉk 37 89 64. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: **ilek-a**. Se rilatas al *Juna amiko*, uzu konton **juna-l**. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri via enpago. Membreco 1994: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.
Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj (300 HUF) de reform-eŭropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo. Konto: OTP Budapest XXII ker, fiók 546-006891-8.